

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



2009

12

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2009. №12 (182)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2010

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldon: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 23a paĝo.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 600 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2009.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2009, №12 (182).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 16 ноября 2009 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Respondoj al amikoj

Je la Zamenhofa Jubileo estas utile aperigi ĉi-loke ne vortojn de iu el niaj kolumnistoj, sed tiujn de la unua esperantista ĵurnalisto, Ludoviko Zamenhof, kiu ekde la dua numero de *La Esperantisto* en la rubriko *Respondoj al amikoj* rekte korespondis kun la legantoj de la unua esperantista gazeto. Kelkaj Zamenhofaj respondoj daŭre validas, ekzemple, la du plej unuaj respondoj el la dua numero:

Al Sinjoro I.v. en T. Vi plendas, ke en via urbo ĝis nun neniu ankoraŭ ion scias pri la lingvo Esperanto! Nun kiu estas kulpa? Se la amikoj en T. anstataŭ ion fari kaj vastigi nian aferon atendas ke oni laboru energie, ke oni faru la aferon pli konata en ilia urbo — tiam nia afero neniam progresos en Via urbo. Vi demandas min kial nia afero estas ankoraŭ malmulte konata en Via urbo!! Ne forgesu, ke en nia afero mi estas nur unu el la laboristoj, kaj se mi devus mem kaj sola fari la tutan aferon, kiu devas esti farata de multaj amikoj en multaj lokoj, tiam nia afero estus perdita.

Al Sinjoro M-n en G. Via letero estas subskribita: “Unu el la plej varmaj amikoj de la lingvo Esperanto!” Mi efektive memoras, ke de tempo al tempo vi sendas al mi leterojn kun demandoj pri la irado de la afero; sed neniam ankoraŭ Vi skribis al mi kion Vi mem faris por nia afero. Varma amiko de nia afero povas sin nomi ne tiu kiu ĉiam demandas, sed nur tiu kiu laboras por nia afero kaj vastigas ĝin. Anstataŭ demandi min ĉiumonate “kio estas farita”, Vi devas en la fino de ĉiu monato demandi Vin mem: “kion mi faris por nia afero en la pasinta monato?”

kaj du pliaj respondoj el la du sekvaj kajeroj:

Al s-ro R. en Moskovo. Sinjoro B. estante ankoraŭ en Varsovio havis ĉiam la kutimon paroladi “ni laboris”, “ni faris” k.c. Sed efektive li absolute nenion ankoraŭ faris, li ne alportis ankoraŭ eĉ unu novan amikon al nia afero, kaj eĉ sian propran “promeson” li ankoraŭ ne alsendis. Mi ripetas, ke ĉiu kiu ne faras al si en la fino de ĉiu monato la demando[n] “kiom da novaj amikoj mi alportis al la afero”, tiu ne povas sin nomi amiko laboranto de nia afero, se li eĉ tute bone ellernis la lingvon. (*La Esperantisto*, 1889, №3, p. 24).

Al s-ro M. en S. Petersburg. Via energia laborado estas tre laŭdinda; sed Via faremeco estus multe pli utila por nia afero, se Vi uzus ĝin en alia maniero. Anstataŭ la personoj, kiujn Vi gajnis por nia afero kaj kiuj nenion faras, estus pli utile se Vi povus gajni unu aŭ kelkajn riĉulojn, kiuj volus ion fari por nia afero. La plej bedaŭrinda fakto en nia afero estas tiu, ke ni ne havas ankoraŭ inter niaj amikoj eĉ unu riĉulon, kiu povus kaj volus ĝin subteni. En nia tempo sen rimedoj materialaj ĉia afero povas progresi nur tre malrapide, kaj ĉiu paŝo kosta doloron kaj suferon. (*La Esperantisto*, 1890, №4, p. 27).

Sur la kovrilpaĝo estas foto, farita de Mateusz Hołownia ĉi-somere en la malfermo de la Centro Zamenhof en Bjali-stoko.

Centro Ludoviko Zamenhof: peno realigi la revojn

La ideon establi en Bjalistoko kulturcentron ligitan kun esperantismo lanĉis en la 1920-aj jaroj la fervora Esperanta gvidanto kaj ĵurnalisto, Jakobo Ŝapiro. Li proponis krei en la tiam ekzistanta naskiĝdomo de Ludoviko muzeon omaĝe al li. Nek tiuepoke, nek dum la tempo postmilita la koncepto sukcesis. En 1987 dum la Universala Kongreso prezentita estis grandioza ideo krei en la urbo Mondan Centron de Esperanto. Pro troaj planoj la tiam kreita Fondaĵo Zamenhof ne povis kolekti sufiĉe da mono, malgraŭ ia apogo kaj de la esperantistaro kaj de la urbaj instancoj.

Vera *verda revolucio* okazis en la jaro 2007, kiam en Jokohamo oni akceptis Bjalistokon la kongresurbo en 2009. Tiutempe kreskon de interesiĝo pri Esperanto certigis ne nur la nombro da kursanoj kaj plia scio pri la lingvo kaj ĝia kreinto, sed ankaŭ realaj decidoj de la urbestro. Promesita estis krei en Bjalistoko Centron Ludoviko Zamenhof, kiu estus digna omaĝo al la fama samurbano. La elektita loko estis kaduka domo de iama hospitalo en la urbocentro, ĉe la strato Warszawska 19. Ĝia stato devigis la konstruistojn grandparte malkonstrui kaj refari la murojn. Samtempe preparata estis de bjalistokaj historiistoj kaj varsoviaj ekspoziciistoj multmedia ekspozicio kiu okupas la ĉefan parton de la teretaĝo. En ĝi la vizitantoj promenas kun la juna Ludoviko tra Bjalistoko el lia epoko, aŭdante tiamajn parolbruojn kaj spektante ĉion, pro kio en la kapo de la juna knabo naskiĝis postaj ideoj pri la lingvo. La unua etaĝo estas destinita por portempaj ekspozicioj, en la flankala alo estas granda

prelegosalono kaj ankoraŭ unu ekspoziciejo.

Ĉion ĉi povis vidi dumil esperantistoj, kiuj vizitadis la domon tuj post ĝia solena malfermo kaj dum la plej grava Esperanta evento — la 94-a UK. Kun helpo de esperantlingvaj volontuloj, krom la ĉefa ekspozicio oni povis admiri Esperantajn ekslibrisojn kaj brodaĵojn.

La kongreso pasis, kaj multaj pensis, ke Esperanto estos forbalaita el la konstruaĵo. Oni timis, ke la estraro de la Centro ne volos plu okupiĝi pri la artefarita lingvo kaj ke ĝi estos simple unu el partoj de Bjalistoka Kulturcentro. Tio ne okazis. Kompreneble, la institucio ne okupiĝas nur pri Esperanto kaj Zamenhof kaj dekomence ne tia estis ĝia destino. Granda parto de okupiĝo de la oficistoj tie estas ekzakte tio, danke al kio Esperanto povis naskiĝi: multkultureco de Bjalistoko kaj ĝia regiono, Podlaĥio.

Tial somere en ĝi gastis Tibetaj monaĥoj, septembre prezentita estis la antaŭmilita rusa oficiro kaj mecenato Kavelin, oktobre oni povis ekkoni ciganan muzikon kaj arton, novembre — admirataj estis malnovteknikaj fotoj de judaj spuroj kaj la regiono... kaj planataj estas multegaj pliaj iniciatoj kiuj celas integriĝon de la Bjalistoka “babelturo” — la minoritatoj, iliaj kulturoj, lingvoj kaj tradicioj.

Revenante al la temo de Esperanto mem — multaj kongresanoj vidis en la urboplaco fotistojn, kiuj fotis homojn kun tabuletoj. Sur ili estis esperantlingvaj vortoj. Tiel registritaj estis kaj bjalistokanoj, kaj esperantistoj, kiuj povis elekti ŝatatan vorton kaj esti registrita en

la evento “Doktoro Esperanto”. La fotojn povis trarigardi vizitantoj en la Centro kaj nun ili troviĝas ĉe la retadreso www.doktoroesperanto.pl.

Ekde oktobro en la Centro mi gvidas lingvokurson por 28 partoprenantoj. Post duonjaro oni lanĉos novan grupon kaj verŝajne instruadon por mezniveloj. Ĉar la oficistoj de la Centro ne parolis antaŭe Esperanton, ankaŭ al ili mi instruas. Ĉiuj lernas tre volonte, kaj mi ĝojas, ke kaj la estro, kaj ĉiuj ceteraj kune amuziĝas esperantlingve tute egalece, nerigarde al siaj postenoj.

La ekspoziciojn vizitadas ankaŭ urbaj lernejoj. Por diversiĝi al ili allogaĵojn kaj ne devigi ilin nur sekvi la ekspoziciojn, kreita estis aro da ludoj, kiu en amuza maniero lernigas dum kelkdek minutoj la bazon de Esperanto.

De du jaroj al Bjalistoko oni sendas esperantlingvajn librojn. Laŭ interkonsento kun la urbaj instancoj printempe oni malfermos Esperantan bibliotekon en la Centro. Grandega libraro jam estas katalogata de Eŭropa Volontulo, esperantisto Christophe Chazarein. Savitaj estis pluraj librokolektoj de podlaĥiaj esperantistoj, foje tre valoraj brokantaĵoj, kiuj eble perdiĝus sen tia iniciato. Amason da libroj alsendis Pollandaj kaj alilandaj esperantistoj. La biblioteko estos loko de viva kulturo esperantista. La Podlaĥia Biblioteko jam promesis, ke la kolekto estos enkomputiligita.

La Centro helpas ankaŭ al Bjalistoka Esperanto-Societo organizi ĉiujarajn Bjalistokajn Zamenhof-Tagojn.

Mi kunlaboras preskaŭ de la “naskiĝo” de la Centro kun ĝiaj oficistoj. La timo pri iliaj skeptikeco kaj malkonfido rapide forpasis. La etoso de egaleco kaj interesiĝo pri la taskoj estas daŭra en la institucio, kiu kun Bjalistokaj esperantistoj kunlaboras, kaj tio donas esperon je estontaj, interesaj projektoj kiuj baldaŭ estos malkaŝitaj. Danke al tio malfacilas trovi en Bjalistoko homojn, kiuj pri Esperanto ne scias, kaj post ĉiu monato pli facilas trovi bjalistokanojn, kun kiuj eblas paroli en Esperanto.

Antaŭ nelonge aperis la retpaĝo de la Centro. Ĝiaj tri lingversioj troveblas ĉe www.centrumzamenhofa.pl.

Przemysław Wierzbowski

La apuda foto donas imagon pri tio, kion oni povas nun vidi en la ekspozicioj de la Centro Zamenhof. (Fotis Krzysztof Bezubik)



Interproksimigo de kulturoj

La Ĝenerala Asembleo de UN deklaris la jaron 2010 Internacia Jaro por la Proksimigo de Kulturoj kaj konfidis al Unesko prepari kaj gvidi ĝin.

Unesko vidas gravan rolon por la neregistaraj organizaĵoj en la agado pri la laŭvica tema jaro. La Estraro de UEA akceptis la inviton de Unesko kaj elektis kiel la temon de la 95a Universala Kongreso de Esperanto en Havano (17–24 jul 2010) “Interproksimigo de kulturoj”. Baldaŭ estos anoncita reĝisoro de la kongresa temo, kiu planos kaj kunordigos ĝian traktadon dum la UK.

La Estraro celas, ke la temo estu traktata ne nur inter la kongresanoj en Havano sed kiel eble plej vaste jam antaŭ la UK. Por stimuli diskuton, artikoloj pri interproksimigo de kulturoj aperos en la revuo *Esperanto* kaj oni serĉos taŭgajn formojn por trakti ĝin ankaŭ rete. Kadre de tio oni invitos esperantistojn kontribui aparte, sed ne ekskluzive, pri siaj spertoj rilate la utilecon de Esperanto por la interproksimigo de kulturoj.

GK UEA

IKU invitas prelegontojn

Dum la 95a UK en Havano okazos la 63a sesio de Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi ĝis 31 jan 2010 proponojn de prelegoj al la sekretario de IKU, prof. Amri Wandel, PK 767, IL-71799 Makabim, Israelo; rete: amri@huji.ac.il.

Lige kun IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Proponantoj de IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kies unua prelego estos parto de IKU kaj kiu aldone havos du daŭrigajn prelegojn. Bonvolu indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Estos aparte bonvenaj proponoj ligitaj al la temo de la 95a UK “Interproksimigo de kulturoj”. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la kandidato (kune ne pli ol unu paĝo).

La proponoj estos prijuĝitaj de la IKU-komisiono, kaj sekve la Estraro de UEA decidis, kiuj estos akceptitaj. Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Prelego estos rekompencita per honorario 240 eŭroj.

GK UEA



La kvin petaloj el Osijek

“120 jaroj da Esperanto en Osijek kaj Kroatio”, — estis la titolo de la renkontiĝo de kroataj esperantistoj 17 okt 2009 en Osijek (nord-orienta Kroatio), kun cento da partoprenantoj el Kroatio, Hungario, Italio, Bosnio kaj Serbio.

Pri kia jubileo temas? En la jaro 1889 Zamenhof kompilis la unuan adresaron de esperantistoj kun la adresoj de mil personoj, inter kiuj estis kvin adeptoj de Esperanto el la urbo Osijek. Per tio osijekanoj estas la unuaj esperantistoj en Kroatio, iama Jugoslavio kaj en la sud-orienta Eŭropo. La afero estas eĉ pli interesa, se oni konsideras, ke temas pri kvin junulinoj.

Kelkajn tagojn antaŭe estis eldonita la kroatlingva libro *Kvin petaloj el Osijek*, en kiu la aŭtoro Davor Klobuĉar prezentis detale la vivojn de tiuj junulinoj kaj la riĉan Osijekan Esperanto-historion.

Sed la ĉefa trofeo, kiun esperantistoj gajnis dank’ al la Kvinopo, estas la Esperanto-strato en Osijek, kiu estis solene malfermita kun konvenaj paroladoj kaj muziko.

Post komuna tagmanĝo la partoprenantoj iris al la Infana Teatro de Osijek, kie estis la ĉefa programo. Parolis Boriša Miliĉević (Serbio), kiu antaŭ 30 jaroj malkovris la Kvinopon. Poste pri la libro *Kvin petaloj el Osijek* parolis Josip Pleadin, ĝia presinto. Klobuĉar parolis pri siaj motivoj por la historia esplorado kaj pri ĝiaj rezultoj. Neven Kovaĉić informis pri siaj mecenataj ideoj kaj projektoj kaj donis monon el sia subvencio “Kalendulo” al kvar kroataj esperantistoj, por la projektoj proponitaj de ili. La unuiĝon de Zagrebaj esperantistoj prezentis ties prezidanto Radenko Milošević, kaj ĝiajn Esperantajn eldonojn prezentis Pleadin.

En la kultura parto koncertis la Zagreba lernejo *Davorin Trstenjak*, la Osijeka kantokoruso *Lipa* (Tilio) kaj la drama grupo de la Studenta Esperanto-Klubo el Zagrebo kun la spektaklo *Sur spuro*.

Davor Klobuĉar

Marŝo de paco kaj neperforto


(Landa Agado) Dana Esperanto-Asocio partoprenis fine de oktobro en la marŝo de paco kaj neperforto en Kopenhago. 30 okt la prezidanto de DEA, Ileana Schröder, ĉeestis konferencon kie, interalie, Kostarika parlamentano Alexander Mora Mora parolis pri sia lando. Kostariko antaŭ longe decidis ne plu havi armeon, kaj nun ili havas ministerion de paco kiu kunlaboras kun la ministerio de edukado. En la lernejoj oni enkondukis fakon pri neperforto kaj konfliktsolvo. Konatiĝinte kun Esperanto, li iĝis tre pozitiva al la ideo.

Vespere estis fajrofestoj ĉe unu el la lagoj kie oni sendis lummesaĝojn al la ĉielo, kaj la prezidanto de DEA estis intervjuita de la televida kanalo TV2 pri la ĉeesto de nia movado en tiu aranĝo. 31 okt nia anaro partoprenis la marŝon.

Ileana Schröder

Poŝtmarka omaĝo al Lapenna

Por omaĝi la centan datrevenon de la naskiĝo de Ivo Lapenna UEA mendis ĉe la poŝta kompanio TNT poŝtmarkon kun la portreto de sia eksprezidanto. La nova marko estis lanĉita en la naskiĝtago de Lapenna, la 5an de novembro, kaj ĝia nominala valoro egalas al tiu de la enlanda afranko por letero ĝis 20-grama en Nederlando.



La poŝtmarko estas vendata en folioj kun 10 markoj, mendeblaj ĉe la Libroservo de UEA. Unu folio kostas EUR 5,50 (plus afranko; kvanta rabato ne estas aplikebla).

La eldonkvanto de la marko estas limigita, kaj post la elĉerpiĝo ĝi ne estos represita. Sekve ĝi rapide fariĝos dezirata objekto ankaŭ ĉe ne-esperantistaj kolektantoj same kiel la poŝtmarkoj lanĉitaj en 2008 okaze de la 93a UK en Roterdamo kaj la 100-jariĝo de UEA. Ĉi-jare aperos ankoraŭ dua poŝtmarko, kiu omaĝos la 150an naskiĝdatrevenon de L.L. Zamenhof. Ĝi estos lanĉita en la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 28an de novembro.

GK UEA

La japanoj kongresis

La 96a Japana Esperanto-Kongreso okazis 10–12 okt 2009 en la urbo Kohu, 100 km okcidente de Tokio. La vetero estis bona, post tajfuno trapasinta Japanion antaŭ kelkaj tagoj. Al la kongreso aliĝis 381 personoj, inter kiuj 234 personoj ĉeestis, dum aliaj estas simbolaj aliĝintoj.

Laŭ la kongresa temo, “Esperanto, Tergloba lingvo de la 21a jarcento — 150a datreveno de Zamenhof” okazis prelegoj de Huĝimoto Tacuo (la Feneŝtro al Ludovikito) kaj Kawanisi Teturoo, kiu kompilis la kongresan memoraĵon *Nova Zamenhofa Legolibro* el la verkoj de Zamenhof paralele en la japana kaj Esperanto. Ne nur kongresanoj sed ankaŭ aliaj civitanoj aŭskultis unu-horan deklamadon pri la vivo de Zamenhof, faritan japanlingve en la tradicia deklam-arto “koodan”, de profesia “koodanisto” Kanda Kooyoo.

Ĉi-jare, 40 jarojn post la forpaso de Ossaka Kenĵi, la patro de la japana Esperanto-movado, lia filo Ossaka Ĝojo fote prilumis la vivon de la patro. Memore al Ossaka Kenĵi estis fondita la Premio Ossaka, kaj ties unua honorito, Nohara Kyuiti, estis prilumita per la prezo de liaj verkoj fare de Sibayama Zyun’iti. Dume, Syōzi Keiko estis ĉi-jare honorita per la premio, pro tio ke ŝi eldonadis multajn bonkvalitajn librojn el sia eldonejo *Libroteko Tokio*.

D-ro R. Sachs, germano longe laborinta en Afriko, interese rakontis sian sperton. Alia germano, D. Kleeman, parolis pri la filmo *Taglibroj de John Rabe*, kiu temis pri Ĉinio en 1937 kaj 1938. Bill Mak, kanadano studanta en Ĉinio, prelegis pri antikva ĉina muziko.

Estis movadaj fakkunsidoj de SAT-anoj, delegitoj de UEA ktp. En fakkunsido pri la 9a artikolo de la Japana Konstitucio, kiu malpermesas nian landon havi militopovon, oni decidis gratuli la usonan prezidenton Obama pro la traktado nuligi nuklean armilaron.

Estis japanlingva prelego malfermita al la civitanoj fare de Japana Asocio de Blindaj Esperantistoj, kun 2 temoj; la Traktato pri la rajto de handikapitoj, kaj Eŭropa vojaĝo inkluzive de la Bjalistoka UK kun helpohundo. La volontula grupo de brajligantoj ankaŭ kunsidis.

Ĉiu kongresano ricevis higienan nazkaj buŝ-protaktan masketon kontraŭ gripo, kaj en la halo estis muntita alkohola ŝpruca lavilo, sed fine ne estis katastrofo ĉi-flanka.

Sibayama Zyun’iti



Koreoj diskutis sian strategion

24–25 okt okazis la 41a Korea Kongreso de Esperanto en la Seula Junulara Gastejo kun la temo “La 10-jara strategio de Korea Esperanto-movado”. 82 esperantistoj partoprenis inkluzive de gastoj el Japanio kaj Kongo.

La sabatan vesperon kun la himno *La Espero* komenciĝis inaŭguro, en kiu salutis la prezidantoj de KEA, KAEM, LKK. Poste salutis reprezentantoj de lokaj grupoj kaj eksterlandaj esperantistoj. Estis donitaj la Hajpin-Premio, la Premio Lee Chong-Yeong, la Premio al bona Esperanto-rondo en 2009, kaj la Premio al personoj kontribuintaj al Korea Esperanto-movado.

La labor-programo ŝajnis peza, sed funkciis freŝe kaj bonkvalite. Kadre de la kongresa temo troviĝis du el tri prelegoj en Kongresa Universitato, du diskutoj pri la kongresa temo, kaj Simpozio.

La du kongrestemaj prelegoj estis “Stato de Korea E-movado” kaj “Kial oni selektis la temon?” La unua skizis ĉefe Esperanto-edukadon, financon, membriĝon al KEA, kaj aliajn aferojn aŭ problemojn dum la lastaj dek jaroj. La dua klare kaj konvinke klarigis, kial ni bezonas informiĝi pri tiaj aferoj, kaj instigis nin proponi bonajn viziojn por nia movado.

Dum la diskutado oni vigle kaj profunde traktis jenajn subtemojn: financaj kaj organizaj aferoj de KEA; kunlaboro inter KEA kaj ĝiaj filioj; dezirindaj roloj de gvidantoj; Esperanto-edukado por plialtigi lingvokapablon post baza kurso por ĉ. 700 ĉiujaraj novaj junaj esperantolernantoj el kursoj de universitatoj, Seula Esperanto-Kulturcentro, Daziwon (Esplora Ĝardeno de Amasa Inteligento), Namgang Esperanto-Lernejo, kaj lokaj esperantistaj grupoj, ktp. La Simpozio

okazis dimanĉe, kaj la ĉeftemo daŭris kaj alproksimiĝis al praktikeblaj detaloj kaj rezultoj.

En la kongreso troviĝis specialaj eventoj: interŝanĝo de libroj; prezenti sian karesnomon; fotado kun d-ro Zamenhof (pentrita de Ho Song); bazaro ktp. Infana kurso okazis dum la kongreso kaj la ĉeestantoj povis amuzi sin per ludoj, kantoj ktp.

En la ferma ceremonio substrekiĝis volontulaj servoj sub la verda stelo, preparaj laboroj por Komuna Kongreso inter Japanio kaj Koreio en 2011, graveco de junulara movado, partopreno en Azia Kongreso venontjara, kaj eventuala okazigo de UK en Koreio.

Choi Eun-Suk

44 lernantoj en Benino

Sub la iniciato de du viglaj elementaj lernantoj — Kavegue Koakou kaj Houssou Juste — la Benina elementa lernejo Agamé Quartier enkondukis instruadon de Esperanto. Ekde oktobro 44 gelemantoj de la 5a klaso sekvas la kurson ĉiuvendrede. La lernejo troviĝas en la komunumo Lokossa ĉirkaŭ 12 km de la urbo. Ili kantas, nombras kaj reciproke salutas Esperante. Baldaŭ komenciĝos la skriba parto.

François Hounsounou

Foto: Kavegue Koakou kaj Houssou Juste



Kio estas Drondo?

“Estas bone interparoli”, — jen famkonata slogano de iu brita telefona firmao antaŭ kelkaj jaroj. Kaj veron enhavas la frazo.

Eĉ mi, membro de generacio kiu flankenĵetis telefonan konversacion, povus konsenti. Tamen, tion farus mi nur kondiĉe, ke la konversacio nepre interindu. Min neniel interesas kiu koleras kontraŭ kiu en la “realaj” televidsendoj. Aliflanke diskutoj interesaj kaj lernigaj ŝajnas al mi ege partoprenindaj.

Danke al Derek Tatton tio nun eblas en Britio uzante Esperanton. Sendube homoj ekde ĝia alveno en la mondon per Esperanto pritraktis gravajn aferojn, sed por mi estas tamen bonvena novaĵo, ke mi povas kunsidi kun aliaj havante la celon nur diskuti en ronda grupo.

Do, mi celas sciigi pri la nova vorto *Drondo*, mallongigo de diskut-rondo, kaj lastatempa distra maniero por Esperanto-parolantoj en Britio.

Estas simpla afero: Derek antaŭe preparas notojn pri diversaj temoj, en kiuj listiĝas demandoj temaj. Tiujn li disdonas interrete antaŭ ol kunvenos la partoprenantaro. Kiam la ĝusta horo venas, ni ĉiuj sidas ĉirkaŭ tablo, Derek prezidas la grupon kaj enkondukas la temojn, kaj ni pridiskutas la aferojn.

Jam ni renkontis interesajn faktojn kaj vidpunktojn, diskutis kaj novaĵojn kaj antikvaĵojn, kaj malkovris, ke diverseco certe ĉeestas la Esperantistaron.

Grandan sukceson ricevis la Drondo ekde ĝia apero, kaj Derek nun antaŭpreparas la kvinan sesion, kiu okazos en la sidejo de la EAB en januaro. Fakte, tiel alloga estas la Drondo, ke la venontan akompanos Drondido, samcela grupo por progresantoj de nia lingvo.

Tim Owen

Esperantistoj en Pac-oazo

Ĉirkaŭ 60 personoj ĝuis fine de oktobro la tradician KIES (Komuna Israela Esperanto-semajnfino). Estis tri-taga intensa kunveno en la vilaĝo Pac-oazo (Neve Shalom/ Wahat al Salam) apud Jerusalemo, kie harmonie kunloĝas judoj kaj araboj. Samloke okazis en la jaro 2000 seminario antaŭ la UK en Tel Avivo. La situo estis perfekte taŭga por la KIES-ĉeftemo: paco kaj kunekzisto.

Kadre de la ĉeftemo la partoprenantoj aŭdis de araba loĝanto en Pacoazo pri la vivo de judaj kaj arabaj familioj en tiu unika vilaĝo. Renato Corsetti gvidis provokan diskuton pri la Mezorianta konflikto “Demandoj al Israelanoj pri paco kaj la araboj”, kiu ĝuis viglan partoprenon. Alia populara programo estis “Invito al Go-ludo” kiun gvidis Gian Piero Savio (GPS) helpe de komputila ekrano. Okazis multaj pliaj prelegoj, kiel “La kibuco en la nova epoko” de Cvi Sholt, aŭ “400 jaroj de la teleskopo” de Amri Wandel, komuna kantado kaj dancado kaj pluraj ekskursoj al la belaj naturo, monaĥejoj kaj historiaj lokoj en la ĉirkaŭaj regionoj. Oni eĉ produktis specialajn T-ĉemizojn por la KIES.

En la tradicia resuma forumo, multaj el la partoprenantoj opiniis ke estis la plej sukcesa KIES ĝis nun, pro la etoso, la riĉa programo kaj la variaj ekskursoj.

Partoprenis ankaŭ 11 eksterlandanoj, el Ruslando (7), Italio (2), Japanio kaj Germanio. Por ili estis organizitaj ekskursoj al la ĉefaj vidindaĵoj en Israelo, antaŭ kaj post la KIES: dum tuta semajno israelaj samideanoj akompanis kaj gvidis la eksterlandajn gastojn al Jerusalemo, la Morta Maro kaj Masado kaj al la nordo — Hajfo (bahaaj ĝardejoj), Nazareto kaj Akko.

Amri Wandel

Kulturo kaj turismo tutsemajne

En la 17a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Pineda de Mar (Barcelono) 3–10 okt partoprenis 115 gesamideanoj el diversaj landoj. Jam la unuan tagon okazis la unua rekta-metoda leciono de Esperanto, sub la gvido de Stano Marček. Vespere oni ĝuis la unuan interkonatiĝon, en kiu ne mankis la ĉampano *Esperanto*, dolĉa vino kaj aliaj frandaĵoj. La vespera programo ripetigis merkrede, kun la sama celo kaj “ingredienĉoj”.

Dimanĉe estis la inaŭguro de la Semajno, sub la prezido de la urbestro, Xavier Amor, kiu venis akompanata de kvar magistratanoj. Li diris, ke kiel urbestro de ĉi tiu turisma urbo, li bone konas la lingvajn problemojn.

Estis enprogramitaj diversaj prelegoj. Gullem Nicolas detale informis pri la florkulturado. D-ro Wolfgang Gunther prelegis pri poŝtarto “Postal-Mail Art” kaj dediĉis parton de sia tempo al ligo de la atmosfera poluado kun Esperanto, kio levis polemikon, ĉar Esperanto rilatas neniam al la poluado.

Antonio Marco prelegis pri la popolistilo en la poezio de Lorca. Kiel kutime estis debato pri Esperanto: “Ĉu la estonteco de Esperanto troviĝas en Afriko”. La diskutado konkludis, ke almenaŭ hodiaŭ Afriko ne povas porti la torĉon de la Esperanta-movado.

La plej ĝuata programero estis la aljuĝo de la premio *Ada Sikorska Fighiera* al Katalin Kováts. Ŝi regalis nin per la prelego pri Vincent Van Gogh.

Estis tri ekskursoj. Ni vizitis la muzeon pri sciencoj de Katalunio en Terrassa, la muzeon “Historio de Katalunio” en Moia, kaj privatan aŭtomobilan muzeon kun 138 aŭtoj kaj granda kvanto da motorcikloj.

Prof. Claude Roux nin instruis pri la natursciencoj en PIV, d-rino Rafaela Urueña disertis pri la tutmonda klimatsanĝo, kaj fine Liba Gabalda projekciis sian filmon *Bildoj pri Venezuelo*, kun Esperantaj komentoj.

En la ĉiujara folkloro nokto ni denove ĝuis havanan muzikon kun la orkestro *Montguic*, kaj, kiel ĉiam, la samideanaro gustumis la faman bruligitan rumon *cremat*, kafon kaj aliajn specialaĵojn.

Niaj laboroj komenciĝis je la oka matene kaj daŭris ĝis la meznokto.

Venont-jare la Semajno okazos en Comaruga (Tarragona) 2–9 okt. Informojn petu ĉe: luis_serrano@ya.com kaj luis_serrano@mixmail.com.

Luis Serrano Pérez



Ĉinio: du sinsekvaj aranĝoj

15–16 okt 2009 dudeko da instruantoj el Ĉinio, Koreio, Hispanio kaj Usono ĉeestis la seminarion de ILEI-Ĉinio kun la temo “Kiel lernigi Esperanton al lernantoj” en la montvilaĝo Tingtao piede de pitoreska Lushan-Montaro en la sud-ĉina urbo Jiujiang.

Profesorino Gong Xiaofeng (Esperanto-nomo Arko), la sekciestro de ILEI-Ĉinio, faris labor-raporton de la sekcio por 2008–2009, konigis la labor-planon por 2010 kaj petis opiniojn de la ĉeestantoj. Wei Yubin kaj Song Ping prezentis respektive trejnadon de Esperanto en la urboj Taiyuan kaj Harbino. Dennis Keefe konigis Esperanto-instruadon ĉe la Universitato de Nankino kaj Augusto Casquero prelegis pri planlingvoj. Dennis Keefe kaj Arko montris instru-metodojn de Esperanto. La ĉeestantoj diskutis pri problemoj de la sekcio, pri lernolibroj, instruhelpiloj, metodoj, son- kaj vidmaterialoj ktp. Oni decidis okazigi la sekvan seminarion de la Ĉina Sekcio de ILEI en aŭgusto 2010 en Taiyuan de Shanxi-provinco.

Tuj poste en la sama loko okazis la tritaga 2a Lushan-Forumo de Esperanto kun kvardeko da partoprenantoj, inkluzive de ĉiuj ĉeestantoj de la instruista seminario.

Dum la interkona vespero ni anstataŭigis la tradician manieron per ludo, kvizo kaj stafeta laŭtleĝado de la *Eta Princo* en Esperanto, kaj kun kantoj kaj dancado en la fino.

Post la inaŭguro prezidanto Gong Xiaofeng prezentis al la ĉeestantoj la agadon de Jianĝi-a Esperanto-Asocio dum 2008–2009; ŝi informis, ke la asocio finfine fariĝis laŭleĝa asocio. La programo de la forumo estis riĉa kaj bonkvalita. Entute okazis 13 prelegoj kaj du Esperanto-kursoj fare de Dennis Keefe kaj Augusto Casquero.

Dum la koncerto Liu Zhichun kaj Trigo ludis respektive flutojn ĉinan kaj eŭropan, kaj la sonoj de flutoj disfluis en la silenta kanjono. Augusto Casquero montris filmeton faritan dum UK en Bjalistoko. En la filmeto la partoprenantoj salutis al ĉinaj esperantistoj unu post alia. Dum la ekskurso ĉeestantoj grimpis al la montpinto, ĝuante belegan akvofalon kaj freŝan aeron.

Dum la forumo la konsilantaro de Jianĝi-a E-Asocio trovis tempon por kunsidi kaj faris decidon, ke la 3a Lushan-Forumo okazos en la ĉefurbo Nanchang, en oktobro 2010.

Gong Xiaofeng



Prof. Gong Xiaofeng multe laboris en la seminario de ILEI-Ĉinio kaj en la Lushan-Forumo. (Foto de ĈIIC)

Ludoj por instrui nian kulturon

La Nederlanda ILEI-Sekcio, NGGE, okazigis 17 okt sian tradician Studotagon en la Centra Oficejo de UEA.

Ĉi-jare la temo estis “Ludoj por instrui Esperanto-kulturon”. La ĉefpreleganto estis Ana Montesinos de Gomis, hispandevena esperantisto el Britio. Ŝi vigle prezentis diversajn ludojn kaj lasis al la partoprenantoj la eblecon ludi por testi la materialon.

En la posttagmezo okazis telekonferenco kun la ĝemela ILEI-Sekcio en Kubo. Tiam la prezidanto de la Kuba Esperanto-Asocio kaj estrarano de ILEI, Julián Hernández Angulo, prezentis la situacion de la instruado de Esperanto en Kubo kaj varbis por la diversaj eventoj okazantaj en la venonta jaro en Kubo (ILEI-Konferenco, UK kaj IJK).

La prezidanto de NGGE, Rob Moerbeek, prezentis novajn eldonaĵojn speciale emfazante tiujn, kiuj iel pritraktas Kubon aŭ estas eldonitaj tie.

Atilio Orellana Rojas

Somerkursaro en januaro

La Aŭstralia Esperanto-Somerkursaro 2010 okazos 10–23 jan ĉe “International House”, la loĝejo de internaciaj studentoj de la Universitato de Sidnejo — kiu troviĝas en la mezo de la urbo-centro. La lecionoj komenciĝos lundon matene. Estos 5 niveloj, de porinfana klaso ĝis stimula kvara nivelo.

Januaro estas bonega tempo por viziti Sidnejon, ĉar tiam okazas tre multo. Estas la plaĝoj, restoracioj kaj sporto, kaj krome en januaro okazas la Festivalo de Sidnejo, kiu proponas riĉan programon, kun artistoj el tuta Aŭstralio kaj el aliaj landoj: la programo enhavas dancojn, teatron, muzikon, “vid-artojn”, miksgenrojn kaj forumojn.

www.aesk.esperanto.org.au

Paul Gorny

Faulhaber-konferenco

Je bela sabata mateno (10 okt) kolektiĝis ĉirkaŭ 30 esperantistoj por partopreni la Faulhaber-konferencon. Per ĝi la asocio Esperanto Nederlando markis la jaron 2009, kiu enhavas la 150an naskiĝdatrevenon de Zamenhof. Kun kafo kaj frandaĵoj ni estis bonvenigitaj en la gastejo Zeeburg en Amsterdamo, sed la alvenintoj ne havis multe da tempo por babili. Nepris atenti la horloĝon, ĉar la organiza teamo sukcesis kunmeti vere abundan programon!

El ĉiaj vidpunktoj ni pritraktis la personon de la kreinto de Esperanto samkiel lian heredaĵon. Post enkonduko de Ans Bakker-ten Hagen, Hans Bakker legis al ni la kortuŝajn priskribojn pri la juna Zamenhof el la fama verko de lia amiko Edmond Privat. Poste Bert de Wit testis niajn sciojn per Zamenhof-kvizo. Por nia lingvo ja plej gravas instruado, kaj tiu temo do ricevis vastan atenton en superrigardo pri multaj malnovaj kaj modernaj instrumentoj, kiujn ni pristudis teorie sed ankaŭ elprovis praktike. Kondukis nin tra la temo la sperta instruisto Sylvain Lelarge.

Post tiom da streĉa atentado ni rapidis al la manĝejo kie ni ĝuis luksan lunĉon. Refortigitaj ni daŭrigis la programon. Sinsekve prezentiĝis: la riĉaĵoj de la esperanta literaturo en prelego de Gerrit Berveling; sciencaj esploroj pri la lingvo fare de Wim Jansen; vojaĝo al Afriko, kie Svetlana Milanoviĉ kaj Johan Derks instruis al grandaj grupoj da junuloj. Fine, post vespermanĝo, Douwe Beerda montris kiel la nova retejo de NEJ informas en nunstila maniero. Tiel ni atingis la finon de la programo, kaj tio estis konvena por pluraj partoprenantoj kiuj venis de fore. La ceteraj kompletigis la tagon en apuda trinkejo.

Tio finis la konferencon, sed tamen ne la kunestadon. Dimanĉe gesinjoroj Bakker aranĝis turisman ekskurson tra Amsterdamo. Sub ilia sperta gvidado ni promenis tra la malnova urbocentro, admiris la restaŭritajn atendejojn de la stacidomo kaj esploris la malmulte konatan nordan zonon de la urbo. Bela surprizo estis la bongustega vespermanĝo, kiu atendis nin en la hejmo de Ina Van der Kamp.

Kiel vi vidas, multaj homoj kontribuis al ĉi tiu bela semajnfino. Mi volas kore danki al ili ĉiuj, sed precipe al la Faulhaber-komisiono: Ans Bakker-ten Hagen, Els ten Hagen kaj Ineke Emmelkamp.

Arjen-Sjoerd de Vries



Andrzej Grzębowski jam la 15an fojon vizitis Havajon kun *Esperantotur*.

En Kalifornio kaj Havajo

Okaze de la Monda Tago de Turismo (27 sep) la Internacia Klubo *Esperantotur* en Bydgoszcz aranĝis vojaĝon al Usono tra Kalifornio kaj Havajo.

Nia grupo 26 sep atingis San-Franciskon kie ni vizitis San-Franciskon kaj Oakland-on kaj festis kune kun usonaj esperantistoj la Mondan Tagon de Turismo en belega domo de Vilĉjo kaj Lusi Harmon kaj poste en ĉina restoracio.

27 sep ni flugis al Honolulu, kie bonvenigis nin Steve Wagenseller. Loĝante en la ripozkvartalo Waikiki ni dum unu semajno vizitis Honolulu, Pearl Harbour, busĉirkaŭis la insulon Oahu, vizitis la interesan Polinezian Centron de Kulturo kun vilaĝoj de Nov-Zelando, Havajo, Fiĝio, Samoo, Thaiti, Tongo, ekspozicioj pri Paska Insulo kaj Markizoj, kaj la Mormonan Universitaton por tri mil studentoj. Krome ni sukcesis ekskursi al famaj Sea Life Park, Hanauma Bay kaj Diamond Kratero.

La duan semajnon (3–10 okt) ni ŝipkrozadis, vizitante la Havajajn insulojn — Maui kun la dormanta vulkano Haleakela, Big Island-Hawaii kun aktivaj vulkanoj, kaj Kauai kun la valo Waimea. Ni vidis la plej altajn en la mondo montojn-vulkanojn altajn pli ol 9000 m., el kiuj 6000 m. sub la akvo.

Ni revenis al Kalifornio — Los-Anĝeleso, Beverly Hills kaj Holivudo, kie ĉiam gvidis nin en Esperanto Roberto Burges el Santa Barbara. Fine, 12 okt ni revenis al Pollando tre kontentaj.

Jam la 15an fojon mi gvidis grupojn en Havajo, kaj ni decidis ripeti la sukcesan vojaĝon venontjare laŭ la sama itinero ekde 25 sep ĝis 23 okt 2010 kun la 20a Internacia Esperanto-Kongreso en Honolulu, posta ŝipkrozado tra Havajaj Insuloj, kaj fine revene tra Kalifornio, aŭ daŭrigante tra Marŝalaj Insuloj, Mikronezio, Guamo, Marianaj Insuloj, Japanio, Suda Koreio kaj Ĉinio.

Andrzej Grzębowski

InPaSem: tradicie kaj netradicie

12–18 okt okazis en Dobřichovice apud Prago tradicia Internacia Paroliga Semajno (InPaSem), kiun ĉi-jare ĉeestis nur partoprenantoj el du landoj: el dudeko da ili estis ses francoj, la ceteraj ĉeĥoj.

Tradicie, la kurson por komencantoj gvidis per rekta metodo Stano Marček (SK), la seminarion por perfektigi jamajn parolantojn Marek Blahuš (CZ). Dum antaŭtagmezoj oni lernis aparte, tamen la lastaj 20 minutoj antaŭ la tagmanĝo estis ĉiutage dediĉitaj al komuna kantado en Esperanto. Dum posttagmezoj kaj vesperoj oni laŭdezire ĝuis turismajn promenojn en Prago sub la gvido de Dan Mrázek kaj tra Bohemia Karsto sub la gvido de Petro Chrdle. Kelkaj preferis individuan programon.

Krom la tradicia amuza renkontiĝo kun lokaj esperantistoj en la seminariejo sabat-posttagmeze, ĉi-jare la programo estis spicita per vespera renkontiĝo kun la membroj de junulara Esperanto-klubo en Prago en tipa praga bierejo jaŭde vespere kaj per komuna vespermanĝo kaj sekva neformala babilado kun 25 polaj kaj slovakaj esperantistoj, kiuj tiutempe reverturis hejmen el la Esperanto-urbo Herzberg kaj survoje tranoktis en Prago.

Petro Chrdle

Balo “Unu revo plia”

“Estis tre bone rememori la junecon, dankon! Certe mi revenos en la proksima jaro”, — estis la ĉefa opinio de la plimulto inter 180 ĉeestantoj.

Esperanto Grupo Lazaro Luiz Zamenhof realigis la 24an de oktobro “antaŭ-tempan balon”. Dum la balo, kiu daŭris de la 18a horo ĝis la noktomezo, oni prezentis sur ekrano historiajn bildojn de diskoj, objektoj, produktoj, noveloj, ludiloj, eventoj, ktp. Muzikoj de la jaroj 1970–80aj agitis ĉiujn. Oni elektis kvin stilojn por kontentigi ĉiujn ĉeestantojn. Oni dancis ĉiun stilon dum 25 minutoj kaj poste oni dum kvin minutoj parolis pri Esperanto kaj prezentis ian Esperanto-kanton.

Post tri horoj oni prezentis amatorajn artistojn, kaj danc-instruistoj prezentis sin. Post la konkurso oni ripetis la muzikojn kaj la Esperanto-“gutojn”. Entute, oni dancis dum preskaŭ kvar horoj kaj aŭdis pri Esperanto dum 30 minutoj. Ni disdonis faldfoliojn pri Esperanto al neesperantistaj ĉeestantoj.

Paulo Kverko

Duobla aranĝo en Hameln

24 okt 2009 ĉirkaŭ tridek esperantistoj sekvis la inviton al “aranĝo-duoblo” en Hameln: la Esperanto-Kulturtago 2009 de Esperanto-Ligo de Malsupra Saksujo (EMAS; prezidanto: Thomas Heberlein) kaj 6a Rata Rendevuo de la Esperanto-grupo de Hameln, la “Rat-kaptista Bando” (prezidanto: Heinz-Wilhelm Sprick).

Unue Andreas Kück faris prelegon pri la internacieco de vortoj kaj ilia uzobleco laŭ Regulo 15 de la Fundamenta Gramatiko. Por tion ĉi taksu, li proponis facile aplikeblan teston: Ĝi konsideras ankaŭ lingvajn kulturkomunumojn. Jen detaloj: <http://www.ipernity.com/blog/55667/177243>

Poste Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar donis imponan superrigardon pri la Esperanto-vivo en Herzberg — la Esperanto-urbo. Unu el la tieaj projektoj estas la starigo de Zamenhof-monumento. Al ĝi ĉiuj povas kontribui per akiro de “Zamenhof-briketo” kun individua numero, stampo kaj surskriboj.

Post la tagmanĝo la partoprenantoj estis delogitaj per fajfilo kaj devis atenti, ke ili ne perdiĝu: Post jarcentoj ratkaptisto denove igis homojn sekvi lin — ĉi-foje nek per ia sorĉo nek ĝis ilia malapero, sed per nekutima gvidado tra la urbo. Dum tio li aktore kaj vigle rakontis sep versiojn de la okazintaĵo pri la ratkaptisto de Hameln.



Fotis Heinz-Wilhelm Sprick

Fine la rendevuanoj povis mem diveni la “veran” version. Laŭ la tutmonde konata legendo ratkaptisto per muzikinstrumento unue forkondukis ratojn kaj musojn el la urbo en Vezeron, kie ili dronis. Ĉar li ne ricevis la promesitan rekompencan, venĝe li simile forkondukis infanojn el la urbo en monton, kie li malaperis kun ili.

Post kafotrinkado la sukcesa tago en Hameln finiĝis per pribildita rakonto de Heinz-Wilhelm Sprick kaj Konrad Matheus pri ilia partopreno en la Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko.

Andreas Kück

Profesia spektaklo en Serbio

15 okt en la teatro *Joakim Vujić* en la urbo Kragujevac estis prezentita la unua profesia teatra spektaklo en la lingvo Esperanto en Serbio.

En la spektaklo *Dek tagoj de kapitano Postnikov* aktoris Saša Pilipović (Postnikov) el la teatro *Joakim Vujić*, Mičo Vrhovac (Zamenhof) el Banja Luka kaj Ljubica Gašparević (Lidija) ankaŭ aktorino el *Joakim Vujić*. Surscenigis la spektaklon Milić Jovanović el la grupo *Shelter Sceno*.

La salonego estis plena. La organizantoj preparis simltanan tradukadon por neesperantistoj. La Esperanto-spektaklo estis parto de la solena fina vespero de Internacia festivalo de malgrandaj scenoj kun partopreno de teatroj el Serbio, Britio, Rumanio, Usono, Italio kaj Makedonio.

La spektaklon, krom civitanoj de Kragujevac kaj diverslandaj partoprenantoj de la festivalo, spektis Beogradaj kaj Kragujevacaj esperantistoj.

Dimitrije Janičić

PostSomera Klaĉkunveno

Dum la semajnfino de Haloveno okazis la 14a PSKK, agrabla renkontiĝo por junuloj kaj junaj familioj. La ĉi-jara ejo situis en Zutendaal, en la belga Limburgo. Ĉi-jare ni povis bonvenigi 62 partoprenantojn el ses landoj.

Vendrede vespere, homoj interkonatiĝis, babilis kaj ludis. Sabate estis tuttaga ekskurso al Tongeren. Tongeren estas la plej malnova urbo de Belgio, kaj en la muzeo ni spektis diversajn Gaŭlo-Romanajn restaĵojn, kiuj estis trovitaj en la urbo mem. Post la muzeo oni libere vizitis diversajn vidindaĵojn en la urbo.

Sabate post la vespermanĝo ni organizis malgrandan Movadan Foiron, dum kiu BEMI, TEVA, TEJO kaj aliaj organizoj sin prezentis al la publiko. Post tio venis la klimakso de la renkontiĝo: koncerto de JoMo! Kiel li ĉiam faras, JoMo kaŭzis bonegan etoson dum la koncerto: homoj dancis kaj kunkantis, ĉiu vere ĝuis la koncerton.

Dimanĉe estis diversaj aktivajtoj en la ejo mem, interalie, manlaborado kaj sporto por infanoj, danckurso, kaj prelegoj. Por tiu lasta, ni invitis paron el Kubo. Dum la tuta renkontiĝo ili instruis diversajn interesajn aferojn el sia lando. En la vespero estis karaokeo, kaj homoj ludis kaj babilis ĝis longe en la nokto.

Yannick Vercammen



Saša Pilipović kiel kapitano Postnikov en la teatro *Joakim Vujić* (Kragujevac).

Velura sezono-14

Finiĝis internacia arta festivalo *Velura sezono-14* kaj al la memoro venas *Velura sezono-1*. Ne internacia, ne arta, preskaŭ sovaĝa — enarbara. En 1979 ni eĉ ne revis pri eksterlandaj partoprenantoj. Nur esperantistoj el respublikoj de Sovetunio. Sed nun ili — litovoj, kartveloj, latvoj, kazahoj, eĉ rusoj — estas eksterlandanoj... Tiam la festivaloj estis multnombraj, pure esperantistaj kaj altiris talentajn muzikistojn. Laŭreatoj de *Velura sezono* estis Ĵomart Amzeev, Vladimir Soroka, Marina Korotj, Natali Berce, Anatolij Radajev, Miĥail Povorin, Galina Stanešnikova kaj multaj aliaj. En 1986 la jalta E-klubo estis tiom plena de muzikistoj, ke ni kreis la unuan urban bardan klubon *Zemlja* (Tero) kaj organizis samtempe kun la *Velura sezono* la unuan urban bardan festivalon.

Perestrojko ĉion pereigis: multaj kantistoj elmigris, aktivuloj okupiĝis pri komerco. Nur en 2004, post la 16-jara

interrompo, la festivalo renaskiĝis, sed en tute alia vesto. Ĝia ĉefa celo iĝis propagando de Esperanto. Ĝi fariĝis oficiala urba aranĝo, malfermita por neesperantistoj, kaj pri la koncertoj anoncis ruslingvaj afiŝoj sur la stratoj. Ankaŭ internacia — kun JoMo, Kim Henrikson. Sed Jalto situas malproksime de la centra Eŭropo, kaj eksterlandanoj en la festivalo ne abundis. La enlanda movado sen forta ukrainia E-Asocio stagnas. En 2007 la festivalon partoprenis nur 30 esperantistoj (krom jaltanoj) kaj ĉi-jare eĉ malpli. La kotizoj ne sufiĉas por inviti eksterlandajn kantistojn. Rezulte ĉi-jare en la programo la unuan fojon ne estis koncertoj por la urbo. Feliĉe samtempe okazis urba barda festivalo *Aŭtuna Jalto*, kaj kelkaj esperanto-bardoj partoprenis ĝin, propagandante Esperanton.

La programo estis riĉa, la esperantistoj aktivaj, la vetero bona, la maro varma, la manĝado kaj loĝado tre malmultekostaj. Do, pli bone malmulte, sed pli kvalite. Krom la kutimaj ekskursoj kaj marŝoj okazis kunveno de esperantistoj-komputistoj kaj ekzercoj de rokgimpado. En la koncertoj brilis nia “ora voĉo” Pavel Moĵajev, Maks Ŝabala, Vladimir Menjajl kaj dueto el Ruslando Aleksandr Ĥrustalov kaj Tatjana Orjol.

La Jalta E-studio *Improvizo* (reĝisorino Svetlana Kravcova) prezentis spektaklojn *Longa lango*, *Ĥoristino* laŭ rakontoj de Anton Ĉeĥov kaj monologon de Margarita el *La Majstro kaj Margarita* de Miĥail Bulgakov.

Okazis interesaj prelegoj: Jefim Zajdman kaj Ben Indestege rakontis pri esperantistoj-mondvojaĝantoj, Sergej Bojko pri la Bjalistoka UK, Aleksandra Kovjazina pri multaj E-aranĝoj, kiujn ŝi partoprenis ĉi-jare. Ŝi ankaŭ gvidis turistajn marŝojn al montaro.

Jefim Zajdman

La PostSomera Klaĉkunveno logis al Zutendaal multajn gejunulojn (*Fotis Armelle Piolat*)



Lingva Festivalo en Ĉuvaŝio

De la 11a ĝis la 18a de oktobro okazis la ĉefaj aranĝoj de la 14a Internacia Lingva Festivalo en Ĉuvaŝio (Ruslando).

La ideon de la Lingva Festivalo havis la usona esperantisto Dennis Keefe, kiu okazigis la unuan en la franca urbo Tours en 1996. Kontraste al multegaj foiroj pri lingvoj okazantaj dise tra la mondo la festivalo celas montri la lingvan diversecon pere de lingvaj prezentoj (30-45-minutaj enkondukaj lecionoj pri koncerna lingvo). La Lingvaj Festivaloj, do, estas aranĝoj organizataj de esperantistoj, sed celantaj la ne-esperantistan publikon. Per ili la esperantistoj diskonigas siajn celojn kaj agadojn, dum ili disvastigas la aprezon al la lingva diverseco, toleremo, justeco kaj paco. La Lingvaj Festivaloj en Ĉuvaŝio estas fakte la plej malnovaj regulaj tiuspecaj aranĝoj organizataj de esperantistoj en la mondo, kaj fariĝis bone konataj kaj ŝatataj en Ĉuvaŝio.

La Ĉuvaŝia Lingva Festivalo transiris la skemon de solaj lingvoprezentoj, por kunigi eĉ dudekon da aktivaĵoj por malsamaj publikoj kaj en diversaj lokoj laŭlonge de monato kaj duono por atingi plej vastan diskonigon kaj instigi partoprenon.

Tiucele estis organizitaj, ekzemple, desegno-konkurso por element-lernejanaj (45 ilustraĵoj) kaj ese-konkursoj pri la denaska lingvo por mezlernejanaj (30 verkoj). Malgrandaj grupoj faris lingvajn prezentojn en kvin lernejoj de tri urboj de Ĉuvaŝio. Okazis ankaŭ amuza konkurso por poliglotoj inter teamoj de universitatoj de Ŝupaŝkaro-Ĉeboksaro kaj Uljanovsk. Estis ankaŭ tri koncertoj, i.a. kun la helpo de la Pollanda Ambasado en Ruslando. Elstaris la poezia



koncerto kun kantoj en sep lingvoj, kiu malfermis la Festivalon en la Ĉuvaŝa Nacia Artmuzeo. La Nacia Biblioteko de Ĉuvaŝio organizis dum la festivala semajno ekspozicion de sia prilingva kolekto inkluzivanta gramatikojn de centoj da lingvoj.

Universitata konferenco pri “naciaj kaj internaciaj lingvoj” estis organizita kune kun la Ĉuvaŝa Ŝtata Instituto de Kulturo. La TTT-ejo pri la ĉuvaŝa lingvo chuvash.org publikigis la prezentitajn artikolojn.

Ne temos pri la solaj eldonoj de la festivalo: oni planas eldonon kaj distribuon inter laŭeble ĉiuj lernejoj de Ĉuvaŝio de la fabelo *La ponto de Asamat* tradukita al 23 lingvoj pere de Esperanto kaj desegnita de lernejanaj en unu el la festivalaj konkursoj. La Festivalo produktis ankaŭ retan lingvoenciklopedion kun artikoloj pri pli ol 200 lingvoj, kvankam ĝis nun ĝi ekzistas nur en Esperanto (wiki.lingvafestivalo.org).

Novaj ĉi-jara estis la prezentoj de

alfabetoj okazintaj dum la tagoj antaŭ la kulmina semajnfino, la 17an kaj 18an de oktobro. En du tagoj estis prezentitaj 37 lingvoj kaj 2 komunikodoj antaŭ miloj da partoprenantoj. La Festivalo, krom uzi la fortojn de la Esperanto-movado, profitas el la lingva riĉeco de la urbo danke al siaj multlandaj studentoj, ĉefe venintaj el Azio kaj Afriko. Per tio la Festivalo ankaŭ helpas al ilia valorigo de la gepatraj lingvoj, ĉar ne malofte tiuj studentoj subtaksas ilin. Ekzemple ĉi-jare estis prezentitaj ses afrikaj lingvoj. El ĉiuj prezentoj eble plej elstaris la gela lingvo, parolata de ĉ. 3000 homoj en Vjetnamio, pri kiu parolis Moskva vjetnamologino. Okazis ankaŭ “lingvoteritorioj”, kie homoj povas praktiki difinitajn lingvojn.

La Festivalo ne strebas al la nombro de lingvoj (kiu malproksimas de rekordo), sed al la kvalito de la prezentoj. Tiel, laŭ la konkludoj de la organizantoj post la festivalo, en la venonta jaro oni eĉ pli strebos al la kvalito de la lingvoprezentoj, kvankam eble kaŭzos ilian ioman malplimultiĝon.

Aparte atentinde, ke ĉi-jare oni aparte zorgis pri la ekvilibro de la pezo de la ĉuvaŝa kaj la rusa lingvoj, malgraŭ la malprogreso de la ĉuvaŝa lingvo en la ĉefurbo de Ĉuvaŝio, ĉefe inter gejunuloj, kiuj estas la ĉefa publiko de la Festivalo. Tiamaniere la Festivalo volis substreki, ke la lingva diverseco bonas ankaŭ por la propra lando, ne nur por la aliaj. La Festivalaj dokumentoj estis dulingvaj (kun ĉiama apero ankaŭ de Esperanto) kaj okazis ĉiam lingvoprezentoj en la ĉuvaŝa lingvo, kio ĝis nun ne estis okazinta. Ĉiuj partoprenantoj ricevis donace belan koloran afiŝon kun ĉuvaŝa aboco.

La diskonigo de la Festivalo estis zorge preparita. Unue estis ellaborita trilingva retejo www.lingvafestivalo.org kaj regule aperis informoj en blogo kaj la sociaj retoj *Vkontakte* kaj *Facebook*. Reklamoj pri la festivalo aperis en la ĉefaj Ĉuvaŝiaj retejoj. Televidreklamo en la unua programo de la Ruslanda televido estis dissendita 12 fojojn. Gazetaran konferencon partoprenis du lokaj radioj, du televido kaj kvar gazetoj. Elstaris ankaŭ la kunlaboro kun diversaj organizoj: Ministerio pri Edukado, Pedagogia Universitato, Instituto de Kulturo, Nacia Biblioteko, Nacia Art-Muzeo; asocioj helpantaj per ejoj, volontuloj, prezentistoj, diskonigo; sponsoraj entreprenoj ktp.

JEACR

Fotoj de Hèctor Alos i Font



Tartu: Interlingvistika konferenco

25–26 sep 2009 en la Urbodomo de Tartu (Estonio) okazis konferenco *Inter-naciaj lingvoj en kunteksto de eŭrolingvistiko kaj interlingvistiko* kun partopreno de lingvistoj kaj gastoj el Estonio, Luksemburgio, Litovio, Ruslando. Siajn studojn sendis ankaŭ lingvistoj el Italio, Germanio kaj Svislando.

Salutparolis Karin Jaanson (vicurbestrino) kaj Claude Nourmont (viceprezidantino de UEA), prof Sergej Kuznecov (Moskvo) kaj Jūratė Bartaškienė (Vilno). Ĉeestis la konferencon eksprezidento de la Estona Respubliko, Honora Civitano de Tartu, prof em Arnold Rüütel.

La unuan tagon de la konferenco aperis la naŭa libro el la serio *Interlingvistika Tartuensis*. Ĝi enhavas ĉiujn konferencajn studojn laŭ kvar subtemoj:

— teoriaj kaj historiaj aspektoj de sociolingvistiko kaj interlingvistiko: Aleksandr D. Duliĉenko;

— interlingvistiko kaj eŭrolingvistiko: Detlev Blanke, Aleksandr D. Duliĉenko, Sabine Fiedler, Věra Barandovská-Frank;

— (socio)lingvistikaj aspektoj de esperantologio: Aloyzas Gudavičius, Aleksandr Melnikov, Antonio Codazzi, Renato Corsetti kaj Anna Löwenstein, Brian R. Moon, Oksana Burkina;

— Tartu-Moskva skolo kaj problemoj de la historio de interlingvistiko: Enn Ernits (pri la finn-ugra planlingvo Budinos), Madis Linnamägi, Andreas Künzli, Sergej Kuznecov.

Krome aperis la kvina almanako *Cejano* de la Tartua Esperanto-Societo kun diverslingvaj studoj kaj informoj.

La studoj kaj diskutoj tuŝis sciencistojn, agintajn plejparte en Estonio, konatajn ankaŭ kiel interlingvistoj: Wilhelm Ostwald (kemiisto), Jaan Sarv (matematikisto), Edgar von Wahl (matematikisto) kaj Jakob Linzbach (matematikisto).

Pri la vivo de Jakob Linzbach parolis akademiano Ŭlo Lumiste. Prof A. Duliĉenko klarigis interlingvistikajn ideojn de Linzbach. Pri sia avo parolis la artistino Tiina Linzbach. La konferencanoj fondis la Jakob-Linzbach-Asocion por evoluigi integrite la disciplinojn, kiujn kultivis aŭ antaŭvidis la estona matematikisto kaj interlingvisto Jakob Linzbach (semiotiko, informadiko, kibernetiko, matematiko, interlingvistiko).

En la konferenco estis proklamitaj laŭreatoj de la internacia honorpremio Academicus Ariste:

a) *pro interlingvistikaj meritoj*: prof Aloyzas Gudavičius (Šiauliai, Litovio);

prof Aleksandr Melnikov (Rostov-na-Donu, Ruslando)

b) *pro demokratia lingvokomunikado (Pax linguarum)*: Brian R. Moon (Luksemburgio, vicprezidanto de Akademio de Esperanto).

La premiojn transdonis prof Arnold Rüütel, akademiano Ŭlo Lumiste, kaj Madis Linnamägi. Por la laŭreatoj ludis sur germana liro Karmen Linnamägi.

Madis Linnamägi

En la urbo de la Olimpikoj 2014

16 aliurbaj gastoj kaj pluraj lokanoj partoprenis en la kvinaj Tagoj de la Internacia Lingvo Esperanto (TILE-5) ekde 30 okt ĝis 4 nov 2009 en la Ruslanda nigramara urbo Soĉi.

Malgraŭ la nefavora vetero sukcesis ekskurso al Krasnaja Poljana, kie en 2014 okazos la Vintraj Olimpikoj. La supro de la monto Aibga (2238 m.) estis kovrita de senĉese falanta neĝo.

En la seminario pri Esperanto-agado Ahman Junusov interese rakontis pri sia aktivado en la Helsinka grupo de pacagado, Anatolo Ivasenko prezentis sian libron *Amuza leksikologio de Esperanto*, Rita Karceva montris foto-ekspozicion de la Uljanovska Esperanto-klubo, Aleksej Borodin amuzis per vorto-mozaiko, Vladimir Minin rakontis pri siaj spertoj en Usono. Okazis filmprezentado pri Dimitrovgrad fare de Tatjana Ilutkina. Ĉiu partoprenanto ricevis donace la libreton *Rapid-kurso de Esperanto*.

Dum vesperoj ĉiujn gajigis per kantado Marina Kocarj kaj Aleksej Borodin, komponisto Vladimir Derevjanko kaj Natalja Olejnikova. Tatjana Davidova deklamis siajn versojn. Galina Belenjuk rakontis pri la Bjalistoka UK. Fine, Gennadij Mitrofanov proponis okazigi TILE-6 en Taganrogo okaze de la jubileo de Anton Ĉeĥov.

Vladimir Bespalov

Varbi per skribiloj

(Landa Agado) Germana Esperanto-Asocio kune kun Aŭstria Esperanto-Federacio produktis globkrajonojn kun surprasaĵoj elektitaj laŭ enketo inter esperantistoj. La dezajnon faris Sebastian Kirf. La skribilo konsistas plejparte el la daŭripova materialo “Biograde®”.



Unufraze

★ Eŭropa E-Unio iĝis membro de la civitan-socia platformo por promocio multlingvismon, en la fonda kunveno 23 okt en Bruselo; entute en ĉi tiu organo, iniciatita de la Eŭropa Komisiono, membriĝis 29 organizoj. (*Eŭropa Bulteno*)

★ En la tradicia laborista Homara Festo en Parizo dum la dua semajnfino de septembro, kun ĉ. 600 mil partoprenantoj entute, funkciis E-budo kun dudeko da deĵorantoj, kiuj disdonis multajn informilojn, vendis dekojn da lerniloj k okazigis E-kurseton. (*La Sago*)

★ Giorgio Silfer k György Nanovszky reprezentis la E-literaturon en la 75a mondkongreso de PEN 19–24 okt en Linz. (HeKo)

★ 28 sep 2009 Déogratias Nduwimana, ministro pri akvo, medio k teritorio de Burundio, asignis al Societo Internacia de Paco Universala (SIPU) terenon de 25 hektaroj por plani k konstrui la Civiton de la Paco; ĝi estas la plej ambicia projekto en la afrika esperantismo. (HeKo)

★ 17–20 okt centoj da lernantoj, gepatroj, instruistoj el la lernejoj Bar Hill (apud Kembriĝo, Britio), Nicolai (Herzberg-am-Harz, Germanio) k Komlóstető (Miskolc, Hungario) partoprenis E-renkontiĝon en la orienthungara urbo Miskolc kadre de la Eŭropa programo *Komenio*. (Stefan MacGill)

★ 29 sep la urba Konsilantaro de Trêes Rios (Brazilo) unuanime atribuis la titolon pri publika utileco al la loka E-klubo. (*BEL Informas*)

★ Laŭ iniciato de la e-istino Agnesa Eremija, la Juda komunumo en Beogrado 8 nov 2009 organizis memorkunsidon omaĝe al la 150a naskiĝdatreveno de Zamenhof. (Dimitrije Janičič)

★ 28 okt raport-elekta kunsido de la Armena E-Asocio elektis s-inon Susanna Bagdasarjan prezidanto de la Asocio. (Levon Davtjan)

★ 35 plenkreskuloj k 14 infanoj el Svislando, Francio, Germanio k Pollando ĝuis 16–18 okt 2009 amikan familian etoson de la 2a Svisa Familia E-Renkontiĝo en la alpa vilaĝo Lenk. (*SES Informas*)

★ E-kolektantoj renkontiĝis je la unua oktobra semajnfino en la E-urbo Herzberg okaze de la unua kunveno pri la kolektado de filatelaĵoj, medaloj, glumarkoj, malnovaj bildkartoj, fotoj, insignoj, ktp. (ICH)

Konciza biografio de Lazarj Markoviĉ Zamenhof

- 1859** 3 (15) dec: En Bjalistoko (strato Zielona 6) en la familio de Mordka (Mark Fabianoviĉ) kaj Liba Roĥla (Rozalia) Zamenhof naskiĝas ilia unua filo Lejzer (Lazarj).
- 1869** Aŭgusto: Eklernas en la unua klaso de la reala gimnazio en Bjalistoko, sed post du monatoj forlasas la lernadon pro malsano.
- 1870** Aŭgusto: Denove eklernas en la unua klaso.
- 1873** Aŭgusto: Eklernas en la kvara klaso, sed la lernado daŭras nur kvar monatojn.
Decembro: La familio Zamenhof ekloĝas en Varsovio (strato Nowolipie 28).
- 1874** Aŭgusto: Eklernas en la kvara klaso de la Varsovia 2a vira gimnazio.
- 1878** 5 (17) dec: Festado de la naskiĝo de Lingvo Uniwersala.
- 1879** Majo-junio: Ekzamenoj en la lasta (oka) klaso de la gimnazio.
15 (27) jun: Ricevas la abiturientan ateston kaj arĝentan medalon en la gimnazio.
Aŭgusto: Aliĝas al la medicina fakultato de la Moskva Universitato.
Septembro: Ekstudas en la universitato.
- 1880** Pretigas gramatikon de la jida lingvo.
- 1881** 1 (13) mar: Murdo de la imperiestro Aleksandro II. La situacio en Ruslando malstabiligas.
Majo: Plenumas ekzamenojn en la Moskva Universitato kaj decidas ekŝiĝi el ĝi kaj eklerni en Varsovio.
Somero: Pretigas du kajerojn de Lingvo universala.
Septembro: Ekstudas en la tria studjaro de la medicina fakultato de la Varsovia Universitato.
- 1882** Januaro-februaro: Artikolo *Kion do finfine fari?* en la ruslingva juda semajnjurnalo *Razsvet*.
Februaro: Fondas la pracionistan societeton Ŝeerit-Israel.
26 mar (7 apr): Artikolo *Sub la komuna standardo!* en *Razsvet*.
Aŭgusto: La tria kajero de Lingvo Universala.
- 1883** 18 aŭg: Kunfondas la Varsovian grupon de Ĥibat-Cion kaj elektiĝas kiel la prezidanto de ĝia plenumkomitato.
18 (30) nov: Letero al la anoj de la junulara socialisma juda grupo Bilu.
- 1884** Jarfino: Fino de la universitataj studoj.
- 1885** Februaro-majo: Kuracisto en Veisiejai.
Majo-novembro: Staĝado en la oftalmologia fako de la Varsovia juda malsanulejo.
Decembro-majo 1886: Okulkuracisto en Plock.
- 1886** Majo-junio: Studado kaj staĝado en Vieno.
Aŭtuno: Konatiĝo kun Kejla (Klara) Zilbernik.
- 1887** 18 (30) mar: Gefianĉiĝo de Lazarj Zamenhof kaj Klara Zilbernik.
21 maj (2 jun): Cenzura permeso por la presado de la *Unua Libro* en la rusa lingvo.
14 (26) jul: Permeso por la enmondigo de la *Unua Libro*. Ĉi tiu tago estas konsiderata kiel la naskiĝdato de la lingvo.
9 aŭg: Geedziĝo. La geedzoj ekloĝas en la strato Przejazd 9.



- Aŭtuno: La franca, germana kaj pola eldonoj de la *Unua Libro*.
- 1888** Januaro: *Dua Libro de l' lingvo internacia*.
30 maj (11 jun): Naskiĝo de Adam Zamenhof.
12 (24) sep: Petas la Ĉefan Administracion pri presaferoj permesi eldonon de ĉiusemajna gazeto *La internaciulo*.
3 (15) okt: La peto pri *La internaciulo* estas rifuzita.
- 1889** Januaro-februaro: *Plena vortaro rusa-internacia* kaj *Meza vortaro internacia-germana*.
1 sep: La unua numero de *La Esperantisto*.
Novembro: Establiĝo kiel okulkuracisto en Ĥerson.
1 (13) dec: Naskiĝo de Sofia Zamenhof.
- 1890** 25 mar: Fondo de la Ligo internacia de Esperantistoj.
Majo: Reveno al Varsovio (Nowolipki 21).
Aŭtuno: En la lernolibro *Vsemirnyj jazyk Esperanto* estas presita *La Espero* en Esperanto kaj en la rusa lingvo; ĝi fariĝos himno esperantista.
Decembro: La Ligo ĉesas sen ekfunkcii.
- 1891** Decembro: Decidas interrompi la eldonadon de *La Esperantisto*, sed Wilhelm Heinrich Trompeter surprenas la eldonkostojn kaj asignas al Zamenhof redaktoran salajron.
- 1892** 19 (31) aŭg: Morto de Liba Roĥla Zamenhof.
- 1893** Januaro: Fondo de Internacia Ligo Esperantista, kun Zamenhof kiel la sekretario, kun la celo voĉdoni pri Esperanto-aferoj.
Aŭgusto: *Universala Vortaro*.
Oktobro: Transloĝiĝo al Grodno.
- 1894** Januaro: Komencas publikigi en *Esperantisto* projekton pri reformoj en Esperanto.
15 nov: Voĉdona malakcepto de la reformprojekto. *Ekzercaro* kaj *Hamleto*.
- 1895** 15 aŭg: La lasta (1895, №5-6) numero de *Esperantisto*. Zamenhof por kelkaj jaroj ĉesigas preskaŭ ĉiujn Esperanto-okupojn.
- 1896** Esploras kun Vilhelm Ŝenberg la vidkapablon de ĉiuj lernejoj en Grodno.
- 1897** Oktobro: Reveno al Varsovio (Dzika 9).
- 1900** 3 aŭg: Louis de Beaufront prezentas *Esencon kaj estontecon* en Parizo.
- 1901** Aprilo: *Hilelismo. Projekto de solvo de la hebrea demando*.
6 aŭg: Kontrakto kun Hachette.
- 1902** Zamenhof iom post iom revenas al Esperanto-aktivado.
- 1903** Novembro: *Fundamenta Krestomatio*.
- 1904** 16 (29) jan: Naskiĝo de Lidia Zamenhof.
- 1905** 9 (22) jan: Komenco de la Unua Ruslanda Revolucio.
Julio: *Fundamento de Esperanto*.
29 jul: Nomumita kiel kavaliro de la Honora Legio.
5-12 aŭg: La 1a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Bulonjo-ĉe-Marzo.
- 1906** Januaro: *Dogmoj de hilelismo* en *Ruslanda Esperantisto*.
Marto: *Homaranismo*.
27 aŭg – 5 sep: La 2a UK en Ĝenevo.



Septembro: La unua numero de *La Revuo*, fondita de Carlo Bourlet por ke Zamenhof aperigu siajn tradukojn.
15–23 okt: Partoprenas konsultiĝon de lingvoreformistoj en Bruselo kaj Parizo.

1907 12–17 aŭg: La 3a UK en Kembriĝo.
15–24 okt: La Delegacia Komitato kunvenas en Parizo kaj akceptas Esperanton kun modifoj.
30 nov: Morto de Mark Fabianoviĉ Zamenhof.
La Revizoro (Gogol).

1908 18 jan: Rompo de la kontaktoj kun la Delegacio.
16–22 aŭg: La 4a UK en Dresdeno.

Ifigenio en Taŭrido (Goethe),
La rabistoj (Schiller), *Georgo Dandin* (Molière).

1909 5–11 sep: La 5a UK en Barcelono.

1910 20–25 apr: La 1a Ruslanda Esperantista Kongreso en Sankt-Peterburgo.
14–20 aŭg: La 6a UK en Vaŝingtono.
Marta (Orzeszko), *Lingvaj Respondoj*, *Proverbaro Esperanta*.

1911 26–29 jul: Koresponda partopreno en Kongreso de rasoj en Londono.
20–27 aŭg: La 7a UK en Antvepreno.

1912 11–18 aŭg: La 8a UK en Krakovo.

1913 Majo: *Homaranismo* (unuafoje kun la vera nomo).
24–31 aŭg: La 9a UK en Berno.

1914 1 aŭg: La geedzaj Zamenhof pro la komenco de la mondmilito estas haltigitaj en Kolonjo.
15 aŭg: Reveno al Varsovio post longa ĉirkaŭvojo.
18 okt: Projekto de Kongreso de neŭtrale-homa religio.
Decembro: Alvoko al la diplomatoj *Post la Granda Milito*.

1915 3 mar: Fintraduko de la Biblio.
Komencas traduki fabelojn de Andersen.
Julio: Transloĝiĝo al Królewska 41.
Proponas porĉiaman revizion de Esperanto.

1917 15 feb: La lasta versio de la homaranismo.
Marto: Ekverkas la eseon *Pri Dio kaj pri senmorteco*.
14 apr: Morto.
16 apr: Entombigo.

Ĉi tiu kronologia tabelo unue aperis en la libro *Homarano* (p. 313–315). Por ĉi tiu eldono ĝi estas iomete kompletigita. La kompilinto dankas al Roy McCoy pro la skanado de la suba foto, kiu montras d-ron Zamenhof en ties laborejo.

Kompilis Aleksander Korĵenkov



Subtenado por „Zamenhof-monumento”
en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo

€ 50,-
BRIKETO

ICH

Tio ĉi subvencikvitanco (BRIKETO) je valoro de 50,00 € estas eldonita de Esperanto-Societo Südharz por financi la konstruon de Zamenhof-monumento en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo okaze de la 150-a naskiĝtago de la kreinto de Esperanto D-ro L.L. Zamenhof (15.12.2009).

Nomo: _____ Antaŭnomo: _____
Dato: _____ Loko: _____

Subskribo: _____

© Esperanto-Gesellschaft Südharz (Germania Esperanto-Centro) Grubenhausstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz - die Esperanto-Stadt | www.eskharz.org

Festi la jubileon de d-ro Esperanto en la Esperanto-urbo

En decembro en ĉiu angulo de la mondo okazas Esperanto-eventoj okaze de la naskiĝtago de Ludoviko Lazaro Zamenhof. Ĉi-jare ni festos la 150-an datrevenon de lia naskiĝo. En Herzberg la festo havos esceptan aspekton, kaj tial mi precipe invitas al ĉi tiu loko, la sola loko en la mondo, kiu uzas la oficialan kromnomon “Esperanto-urbo” ekde julio 2006.

Loĝante en Herzberg kaj laborante kiel volontulino en Interkultura Centro Herzberg (ICH), mi povas konatiĝi kun funkciado de tiu fama loko en Esperantujo. Ĉi tie mi preskaŭ ĉiutage travivas gravajn eventojn, observante la penan laboron de la kernaj aktivuloj de ICH Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar, promociantaj la lingvon Esperanto kaj organizantaj multajn Esperanto-aranĝojn. Ĉi-jare, kunlaborante kun multaj esperantistoj, ili dediĉis multe da tempo por prepari la eksterordinaran eventon en la Zamenhof-jaro.

La 15an de decembro 2009 en la Esperanto-urbo Herzberg okazos speciala inaŭgura ceremonio — en la centro de la urbo staros marmora Zamenhof-monumento. Ĝi estos la unua en Germanio. Al tiu speciala evento, al la inaŭgura ceremonio estas invitataj multaj gravaj personoj, reprezentantoj de organizaĵoj, partioj, asocioj. Ni garantias neforgeseblan etoson, riĉan programon kun akcepto en la kavalira salono de la bela kastelmuzeo. Ne mankos muziko, kantado de la gimnazia koruso, kaj estos bufeda akceptado. Valoras alveni pli frue, ĉar jam ekde la 11a ĝis la 15a de decembro estos organizata Speciala Studsesio pri Zamenhof, kie ni trarigardos lian vivon, multflankan agadon kiel verkisto, poeto, tradukisto.

Vi povas komune kunkonstrui la Esperanto-urbon Herzberg, ege gravan lokon por la tuta Esperanto-movado, aĉetante specialan “Zamenhof-briketon” je valoro de 50 eŭroj kun individua numero, stampo kaj subskriboj. Tio helpas financi tiun gravan projekton kaj vi esprimas per ĝi ankaŭ solidarecon kun la urbo, kun la planoj por disvastigi Esperanton.

Venu al Herzberg la Esperanto-urbo, kiu situas meze de Germanio, ĉe la suda flanko de la Harz-montaro kaj estas vizitinda ne nur pro bela pejzaĝo kaj vera ripozo sed ĉi-jare decembre specife pro la Zamenhof-monumento kaj la jubilea festo.

Małgosia Komarnicka



La franca ministro Lellouche per lingvaj strangaĵoj kaŭzis ŝtorman polemikon en gazetaro.

Francio-Britio: semantika konflikto

Dafydd ab Iago el Bruselo

Bruselo estas alkutimiĝinta al problemoj dum tradukado. Kaj esperantistoj kompreneble ŝatas ĉerpi el la riĉa historio de tiaj problemoj.

Ŝajne, la franca ministro respondeca pri Eŭropo Pierre Lellouche volas aldoni plian ekzemplon de lingva miskompreno. Lellouche estas konsiderata kiel brit- kaj usonemulo fiera pri sia kono de la angla. Tamen tio ne evitigis diplomatan krizon, kiam la ministro estis intervjuita de la brita gazeto *The Guardian*. Li parolis pri la skeptika sinteno de Britio kaj de la opozicia partio rilate al Eŭropo kaj eŭropa integriĝo.

Laŭ Lellouche, la *Tories* aŭ konservativuloj, la brita opozicia partio, estas *aŭtismaj* kaj estas *kastrantaj* la influon de Britio en Eŭropo. Li jene diris pri la konservativa partio: “Ili havas nur unu strofon kaj nur ripetas la samon. Estas bizara

sento de aŭtismo”. Lellouche ankaŭ kritikis la planojn regajni potencojn kaj kompetentajn transdonitajn al la Eŭropa Unio. La planoj estis anoncigitaj antaŭ nelonge de la ĉefo de la opozicia partio David Cameron. Lellouche konsideras tiajn planojn *patetikaj** — li diris angle: *pathetic*.

Kvankam la grek-devena vorto *patetika* similas en la franca kaj la angla, kaj en multaj aliaj lingvoj, la efiko ŝajne ne estas la sama en la franca kaj la angla. Lellouche kaŭzis lavangon de protestoj en Britio per siaj vortoj. Kelkajn horojn post sia intervjuo, la ministro jam devis fari klarigon al la brita televido BBC: «*Patetika* signifas *trista* en la franca. Tio signifas, ke mi en Francio estis tristigita, vidante, ke la debato [en Britio. – Da] fariĝas pli kaj pli eŭrop-skeptika kaj kontraŭ-eŭropa». Franc-lingvanoj, laŭ la ministro, ankaŭ pli ofte aŭdas la vortojn *aŭtismo* kaj *patetika*.

Ne ĉiuj francoj samopinias pri la signifo de la malbonŝancaj vortoj. “Mi pensas, ke la franca ministro mistifikas britojn, — opiniis franca legantino de la retejo de BBC. — Unuafoje mi aŭdis, ke *aŭtisma* estas ofte uzata vorto en la ĉiutaga franca. En mia opinio, ĝi rilatas al iu kiu suferas de aŭtismo kaj estas ja kuracista. Mi neniam aŭdis francojn diri ĉi tiun vorton en ĉiutagaj konversacioj kun mi”. Tamen la legantino konfirmis la opinion de la ministro ke la vorto *patetika* havas alian senton: pli *tragika* kaj *malkvietiga*.

La *klarigoj* de la ministro ne malhelpis plian ŝtormon da protestoj ĉe la opozicia partio. Ĉu nur lingva problemeto? Jen demando por lingvistoj. Aŭ eble Lellouche vidante la efikon de siaj vortoj uzis bonan trukon? Ĉu li kulpigis lingvajn diferencojn — la famajn “falsajn amikojn” dum fremdlingva parolado — anstataŭ kulpigi sin mem pro nediplomateco?

Sed certa estas tio, ke eĉ francaj politikistoj en Eŭropo nun devas paroli angle. Dum longa periodo ankaŭ la francoj — kiel la angloj — ĝuis lingvajn privilegiojn. Tiu periodo definitive pasis, kaj la francaj ministroj devas montri siajn konojn de la angla, eĉ je risko de grandaj diplomatiaj stultajoj. Feliĉe, ne okazis plia milito inter la malnovaj rivaloj Britio kaj Francio.

* La vorto *patetika* mankas en NPIV.

La Majstro kaj Müller

En la rubriko *Nia trezoro* (*LODE*, 2009, №11, p. 20.) la prezento de *Literatura Foiro* estis verkita kun senduba kompetento, kaj plezurigis legi pri tiu meritplena kultura revuo. Tamen, ne ŝajnas al mi tute en ordo ke oni publikigas pseŭdoniman tekston de iama LF-redaktoro mem. Mi kredas ke neniu aŭdis pri la subskribint(in?)o Stella Meester (la Majstro kaj Stela?); kaj, precipe, detala stil-analizo elmontrus frapajn paralelojn kun tekstoj publikigitaj, ekzemple, en *Heroldo Komunikas*.

Piednote al la interesaj materialoj pri la Nobel-premiita verkistino Herta Müller: “Ŝia plej aktuala libro, *Spirbalancilo*, temas pri deportitoj [el la rumania regiono Banato. — IE] al sovetia koncentrejo”. Nu, verko de Müller (ankoraŭ?) ne legeblas en Esperanto — krom la specimeno tradukita de Wolfgang Kirschstein — sed indas noti ke la sama temo jam aperas en libro Esperante eldonita. Alia transilvania verkisto minoritatana, Stephan Lang (1945–2008), raportis en sia romano *La talpoĉasisto* (FEL, 2007; trad. Gerrit Berveling) pri la deporto de lia patrino al koncentrejo sovetia.

István Ertl

Valoras reeldoni *Literaturan Mondon*

Ĉiu vere vivanta lingvo havas verŝajne sian t.n. tradicie klasikan literaturon, belsonoran poezion. Tial estas en la oktobra *Ondo* vere bonveninda artikolo de nia talenta multlingvulo István Ertl pri la klasika literatura revuo *Literatura Mondo*, kiu tro frue ne plu povis aperi.

Mi havas jenan revon: pro tio, ke LM ekzistis en tri periodoj, ĉu oni ne povus poŝformate reeldoni 3 volumojn — 1922–1927, 1931–1938, 1947–1949.

Estas grave, ke kompetentaj personoj havu plenan respondecon por la reeldono de tiuj menciitaj tri volumoj. Ankaŭ tre grava faktoro estas, ili aperu sen prezeraroj. Validas la regulo: “Prenu instruon el pasintaj eraroj”. Fine oni esperas, ke UEA povus, almenaŭ parte, financi ĉi tiun gravan eldonon.

Bertil England

Ni citas el Vikipedio: «... “Kooperativo por Represo de Literatura Mondo” en Tokio reprenis la kompletan en 1969–1976. Ties lasta volumo (vol. 6) enhavas aŭtoran indekson. Ankaŭ la japana eldonejo “Ludovikito” reprenis, fidele al la originalo, la plenan kolekton de la Literatura Mondo. Ankaŭ tiu eldonaĵo estis tre sukcesa, tre valora».

Per Esperanto por justa tutmondiĝo

La 1an de novembro 2009 fondiĝis en Wiesbaden (Germanio) la tutmonda esperantista partio UNU MONDO. Ĝi celas partopreni en balotoj ĉie ajn en la mondo por realigi siajn celojn: tutmonda demokratio, homaj rajtoj, paco, justa monda ekonomio, mediprotektado kaj daŭripova evoluo. Esperanto helpu plibonigi internacian kompreniĝon kaj kunlaboron; ĝi servu al lingva egalrajteco kaj faciligu al homoj senti sin mondĉivitanoj.

La ideo de UNU MONDO naskiĝis ĉe germanaj aktivuloj de Eŭropo–Demokratio–Esperanto (EDE) kaj trovis entuziasman akcepton precipe inter afrikaj kaj brazilaj esperantistoj. Kiel prezidanto de UNU MONDO elektiĝis Molière Nangu, angola esperantisto vivanta en Pollando, kiu opinias Esperanton kaj ĝian internan ideon grava rimedo por forigi etnajn konfliktojn. Vicprezidantoj estas Hokan Lundberg (Svedio) kaj Emile Malanda (Suda Afriko), sekretario estas Ulrich Matthias (Germanio); pliaj estraranoj estas Jean Bosco Malanda (DR Kongo, estrarano pri Afriko) kaj Nan Matthias-Wang (Ĉinio/Germanio, estraranino pri Azio). La retejo de la partio estas <http://www.unu-mondo.org>.

Unu el la centraj demandoj en la politika programo de UNU MONDO estas tiu pri justa ekonomia sistemo. En Germanio oni nuntempe diskutas ĉefe du konceptojn por forigi tutmonde malriĉecon kaj mizeron: Precipe konservativuloj kaj kristanoj proponas “ekologi-socialan merkatan ekonomion”, dum maldekstruloj proponas “solidaran ekonomion”. Laŭ la unua propono, merkataj principoj tre gravas por certigi ekonomian kaj teknologian progreson, tamen necesas protekti malfortulojn kaj certigi daŭripovan evoluon. Tutmonda imposta sistemo helpu realigi egalecon de ŝancoj kaj mediprotektadon. Kontraŭe, la “solidara ekonomio” emfazas, ke la celo de entreprenoj ne estu financaj profitoj, sed solvo de socialaj kaj ekologiaj problemoj. UNU MONDO inklinas al kompromiso inter tiuj ĉi du proponoj kaj deziras lasi al siaj landaj sekcioj iom da libero por trovi pozicion, kiu povas allogi balotantojn.

UNU MONDO deziras plibonigi la vivkondiĉojn ĉie en la mondo. Por substreki la seriozecon de la klopodoj, fondiĝos post nelonge “Fondaĵo UNU MONDO” kiel subfondaĵo de la germana “Fondaĵo Mondo”. Ĝi subtenos esperantistajn projektojn de evolua kunlaboro. Eblaj kandidatoj por akiri tian subtenon povus esti la infanvilaĝo “Bona Espero” en Brazilo, la projekto “Mazingira” (de Mramba Simba) por konstruo de lernejoj kaj putoj, por mikrokreditoj kaj por orfoj en Tanzanio aŭ la projekto “Nabouba” (kunordigata de Vladka Chvátalová) por orfoj en Benino.

UNU MONDO deziras kunlabori ankaŭ kun EDE, de kiu ĝi disbranĉiĝis. La origina ideo pluevoluigi EDE al tutmonda partio trovis subtenon nur de kelkaj EDE-anoj (ekzemple de Bert Schumann), tiel ke fine necesis fondi apartan partion. UNU MONDO konscias pri tio, ke EDE povas esti utila organizo por atentigi pri la lingva problemo en Eŭropa Unio; tamen la ĝenerala celaro de la EDE-Federacio (kies statuto mencias nur la celon “provizi la Eŭropan Union per la necesaj iloj por starigi partoprenrajtan demokration”) eble estas akceptebla nur de minoritato de la esperantistoj.

Mi persone opinias la eŭropan parlamentan demokration granda atingiĝo; mi estas decide por la Traktato de Lisbono kaj por sociala merkata ekonomio. Pri referendumoj mi ne havas altan opinion, ĉar ili eble estus malhelpintaj bonajn

aferojn kiel la enkondukon de la eŭro aŭ la plilarĝigon de EU al oriento. Kun tiaj konvinkoj, tute normalaj por germana civitano, mi neniel povis trovi hejmon en EDE. “Eŭropo tute ne estas demokratia, vidu, pri traktato decidas registaroj, ne homoj”, — emocie emfazas francaj EDE-anoj. La fakto, ke EDE mem ne estas demokratia, malpli interesas ilin. Ekzemple mi mem, membro kaj estrarano de EDE-Germanio de julio 2008, ricevis ĝis nun nenian formalan rajton rekte aŭ nerekte ion kundefendi ĉe la EDE-Federacio.


En Germanio EDE dividiĝis dum sia balotkampanjo en du branĉojn: iuj timis, ke esperantistoj volas misuzi EDE kiel varbagentojn por Esperanto, dum aliaj timis, ke EDE volas misuzi la esperantistaron por politikaj celoj. La balotoj mem signifis por multaj el tiuj, kiuj investis sian energion kaj monon en EDE, gravan seniluziĝon, precipe en Germanio (kie EDE ricevis nur 0,04% de la voĉoj), sed ankaŭ en Francio (kie ĝi ricevis 0,17%). “Supozeble la elektintoj estis nur esperantistoj, ties familianoj kaj geamikoj”, — opiniis Stefan Maul en *Monato*, 2009, №8-9. Per novaj ideoj eblas trovi novan entuziasmon.

Antaŭvideble en Francio la tradicia EDE restos pli forta ol UNU MONDO povus fariĝi tie, dum en Germanio (kie EDE partoprenis la eŭropajn balotojn kun nur 28 membroj kaj financaj rimedoj de nur 8.000 eŭroj) UNU MONDO havas ŝancon fariĝi pli forta ol EDE kaj do eble partoprenos anstataŭ EDE en la Eŭropaj Balotoj 2014. Ĝia nomo “Partio UNU MONDO” (“Eine-Welt-Partei”) povus allogi multajn balotantojn en Germanio, ĉar la belsona germana esprimo “Eine Welt” jam fariĝis sinonimo de “justa tutmondiĝo”. Ekzistas miloj da “unumondaj” iniciativoj, al kiuj ĝis nun mankis politika partio.

Ĝuste sur la monda nivelo ankoraŭ tre necesas agadi por demokratio, homaj rajtoj, paco, egalrajta kunlaboro kaj mediprotektado. Ni esperantistoj havas bonajn kondiĉojn por kunlabori tutmonde favore al tiuj ĉi celoj — danke al lingvo, kiu faciligas tiun kunlaboron, kaj interna ideo, laŭ kiu ĉiu “vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton”. Ni eluzu tiun ĉi ŝancon. UNU MONDO povus partopreni eĉ en regionaj aŭ lokaj balotoj, laŭ la devizo “pensu tutmonde — agu loke” de la Agendo 21.

Ulrich Matthias
um@unu-mondo.org

Wiesbaden: Nan Matthias-Wang, Molière Nangu, Ulrich Matthias





REK-26

Rusia Esperantista Kongreso (Sankt-Peterburgo)

2010-05-27/31

Antaŭ cent jaroj (en 1910) en Sankt-Peterburgo okazis la unua Ruslanda Esperantista Kongreso, en kiu partoprenis la kreinto de la lingvo Esperanto Ludoviko Zamenhof. Rusiaj esperantistoj celebros la jubileon per tradicia tutlanda kongreso en la dua rusia ĉefurbo kaj invitas gastojn el la tuta mondo.

Venu ĝui la belegan urbon, ĝiajn muzeojn, teatrojn, katedralojn; promeni piede en parkoj kaj ŝipe sur kanaloj kaj la rivero Neva; venu ekkoni la rusan kulturon kaj trovi amikojn inter rusiaj esperantistoj!

La kongresejo troviĝas tre oportune — en la centra parto de la urbo, nur dek minutojn piede de la stacidomo “Finljandskij” (Finnlanda) kaj metrostacio “Ploščjadj Lenina” (Lenin-placo). Tute proksime estas bordo de la rivero Neva. La adreso de la kongresejo — Kulturpalaco “Viborgskij” (ruse: Viborgskij Dvorec Kuljturi), strato Komissara Smirnova, 15. En dispono de la Kongreso estos bonaj teatra-koncertaj salonoj kun necesa ekipaĵo, konferenca aŭditorio, klasĉambroj. En vastaj vestibloj estas bufedejoj, kie eblas iom trinketi kaj manĝeti dum paŭzoj. En la kulturpalaco estas ankaŭ restoracio kaj malgranda hoteleto.

La programo de la Kongreso estos varia kaj multflanka. Enkadre de la Kongreso okazos vica konferenco de REU, kunveno de REJM, prelegoj pri la historio de la Esperanto-movado en Rusio, pri interlingvistiko, pri lingvaj festivaloj. Ni atendas kontribuojn por la programo ankaŭ de vi! La kongresanoj spektos teatraĵojn en Esperanto kaj kelkajn koncertojn. Estos abunda turisma programo, kiun ornamas “blankaj noktoj” kaj Urba Festo okazonta en la samaj datoj en Sankt-Peterburgo!

Por la kongresanoj estas rezervitaj loĝlokoj en hoteloj de diversa nivelo, situantaj ĉefe en la centra parto de Sankt-Peterburgo. La mendilo por la hoteloj kaj por ekskursaj programoj estos sendita al la kongresanoj kun la Dua informilo.

Kontaktoj de la Organiza Komitato:

Ĝenerala ret-poŝta adreso — kongreso@reu.ru,

Pri aliĝoj, kotizoj, loĝado, invitletoj k.t.p. — rek-financoj@reu.ru

Prezidanto de la Organiza Komitato, turisma programo — Anna Butkeviĉ: annaespero@mail.ru

Pri arta programo — Mikaelo Bronŝtejn: mamuto@rambler.ru

Pri enhavo de prelegoj kaj diskutoj — Nikolao Gudskov: nikolao@yandex.ru

Pri rilatoj kun gazetaro kaj urbaj instancoj — Valentin Seguru: seguru@reu.ru

Pri ceteraj organizaj aferoj — Vjaĉeslav Ivanov: amikeco@gmail.com, kaj Anatolo Sidorov: anasido@gmail.com

Kotizotabelo de REK

| | Ĝis 31.12.09 | 1.01–31.03.2010 | Post 31.03.2010 |
|--|--------------|-----------------|-----------------|
| Rusio kaj aliaj landoj de KŜŜ, membroj de REU (rubloj) | 800 | 1000 | 1200 |
| Rusio kaj aliaj landoj de KŜŜ, nemembroj de REU (rubloj) | 1000 | 1200 | 1500 |
| Landoj B*, membroj de REU (eŭroj) | 25 | 40 | 55 |
| Landoj B*, nemembroj de REU (eŭroj) | 40 | 55 | 70 |
| Landoj A*, membroj de REU (eŭroj) | 50 | 65 | 80 |
| Landoj A*, nemembroj de REU (eŭroj) | 65 | 80 | 95 |

* La kotizoj varias laŭ loĝlandoj, kiuj grupiĝas jene:

A-landoj: ĉiuj landoj escepte de B-landoj;

B-landoj: iamaj socialismaj landoj (krom Rusio kaj landoj de KŜŜ); ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko) kaj Afriko.

Junuloj naskiĝintaj post 31.12.1980, handikapuloj kaj familianoj ricevas rabaton — 50%.

Infanoj ĝis 16-jaraĝaj aliĝas senpage.

La aliĝkotizo estas pagenda al kasisto de REU uzante sekvaĵajn pagmanierojn:

— Per eŭroj al uea-konto — “reua-p”. Kotizante al UEA nepre sendu kopion de ĝirpeto al rek-financoj@reu.ru

— Per eŭroj ĝirante al kontoj en Raiffeisen-bank, en UniCredit-bank (detalojn petu ĉe rek-financoj@reu.ru)

— Per rubloj uzu ordinarajn pagmanierojn: <http://reu.ru/index.php?parto=membreco&pagmanieroj=jes&lng=eo>

Pri ĉiuj demandoj koncerne de la aliĝo kaj kotizado skribu al rek-financoj@reu.ru

La kotizo ne estas repagebla.

La aliĝilon plenu en: <http://www.reu.ru/index.php?alighilo=REK-26>

**“Dormantaj” projektoj**

En la lasta ĉi-jara artikolo ni prezentas kelkajn projektojn, kiuj bezonas/us refreŝigon, refaron, aktualigon. Tamen la projektoj dum certa tempo bone funkciis kaj eble en pli aŭ malpli frua estonteco ili renaskiĝos kaj pluvivos.

RIC (Reta Informado-Centro)

www.informado.net

Celgrupo: Esperanto-informantoj

La retejo ekestis kun la celo kolekti kaj disponigi en unu loko en la reto ĉiujn eblajn Esperanto-materialojn, kiuj rilatas al informado — ĉefe diversajn informilojn: afiŝojn, fald- kaj flugfoliojn, glumarkojn, broŝurojn, k.s. en diversaj lingvoj.

La retejo estis komence subtenita de UEA, sed post la sukcesa komenco mankis tempo kaj homoj por daŭra aktualigado, aldonado de la enhavo, kompletigado kaj ordigado de informiloj. Nuntempe E@I plene koncentriĝas al retejo www.aktuale.info (baldaŭ aperonta), kiu havas celon liveri aktualajn informojn pri Esperanto-agado.

Lingva Prismo

www.lingvo.info

Celgrupo: Lingvemuloj ĝenerale

Ĉi tiu plurlingva paĝaro pri lingva diverseco prezentas aron da lingvoj kaj alfabetoj de la mondo kaj instigas al ekscio pri lingvaj faktoj per enreta kvizo. La retejo ne plu estas prizorgata, sed ĝia enhavo daŭre uzebla kaj interesa.

Nun estas pripensata rekonstruo de la retejo, kun la celo larĝigi la enhavon, krei “prilingvan enciklopedion” kaj kunlaborigi ankaŭ neEsperanto-ajn organizojn.

Interkulturo

www.interkulturo.net

Celgrupo: Homoj scivolemaj pri aliaj kulturoj

Interkulturo estas kunlabora projekto de ILEI kaj E@I, kiu helpas kulturalan interŝanĝon inter grupoj dise de la mondo — por kontakti, konatiĝi kaj interŝanĝi siajn demandojn, dubojn, sciojn, interesojn. La ideo de Interkulturo estas ke grupoj de diversaj landoj duope interŝanĝu sciojn kaj spertojn pri kulturaj temoj.

La retejo jam kvar jarojn ne evoluis kaj bezonas nepre aktualigon kaj refaron. Tamen ankaŭ ĝia enhavo estas daŭre utila kaj uzebla por Esperanto-istoj.

Nitobe-centro

www.nitobe.info

Celgrupo: Agantoj por lingva demokratio

La Nitobe-centro por lingva demokratio stimulas publikan debaton pri internacia komunikado kaj egaleca lingvopolitiko, precipe en la Eŭropa Unio. Ĝi klopodis altigi la nivelon kaj intensecon de la prilingvaj debatoj publikaj kaj politikaj en la kuniĝanta Eŭropo. La retejo estis farita surbaze de mendo de ESF. Bedaŭrinde ĝi ne trovis taŭgan prizorganton — fakulon en la lingvistikaj kaj lingvo-politikaj temoj, tial ĝi nun restas vere dormanta projekto. Parte nun retejo www.aktuale.info transprenas kelkajn ĝiajn celojn.

**Artista Datumbazo**

<http://artista.ikso.net/>

Celgrupo: Organizantoj de Esperanto-aranĝoj kaj Esperanto-artistoj

La artista datumbazo celas plifaciligi la organizadon de koncertoj kaj aliaj artaj aranĝoj ene de kaj ankaŭ ekster Esperantujo. Kerne estas datumbazo kun detalaj informoj pri artistoj. La retejo kelkajn jarojn stagnas, necesas nova paŝo, volontula homforto kaj aktualigado de informoj.

Per tiu ĉi artikolo ni finas la prezenton de E@I-projektoj. Ekde la venonta numero ni pli konkrete okupiĝos pri la uzado de Esperanto en Interreto, pri interesaj kaj utilaj retpaĝoj, programoj k.s.



Peter Baláž

E@I-kunordiganto

Donu podion eĉ al kverelantoj

Tiu, kiu malkonsentas vokas la kontraŭdiranton kverelanto. Ĉu ĉi tiu mesaĝo estas do kverelo?

Estas angla diraĵo: “Mi malaprobis tion, kion vi diras, sed mi defendos ĝismorte vian rajton tion diri” (atribuita al Voltaire en S.G. Tallentyre *The friends of Voltaire* [La amikoj de Voltaire], 1907, p. 199).

Kvereloj, kiuj kaŭzis malamikecon kaj netolerecon, fendis la Volapukan movadon kaj eknaskis multajn “plibonigitajn” idojn de Esperanto. Ne necesas mencii tro entuziasmajn pariojn en la nacia kaj internacia historio de nia movado. Kaj plurfoje amar-akrajn (sed eble pravajn) anstataŭ am-admonajn kritikojn eĉ en *La Ondo de Esperanto* ni tro ofte legas. Ĉio pro tio malfortiĝas, la celo perdiĝas, la persvadenduloj seninteresiĝas, la kredantoj forfalas.

Tio okazas ankaŭ en religioj, politikoj, bonfaraj organizoj. Eĉ inter la de mi plej altestimataj kontribuantoj de *La Ondo* estas iu, kiu, pro sia de mi malaprobado, kiun li eĉ ne volas klarigi, kaj miajn bedaŭrojn ne akceptis, abrupte rompas dum jarodekoj konekton.

Ni donu podion eĉ al kverelantoj, kondiĉe ke nek ili nek ilia aŭdantaro per dolĉaj kaj rezonemaj vortoj parolu. Ni ankaŭ supergrimpu flankan podion, ni antaŭmetu nian kontraŭan vidpunkton, kaj ni instigu ilin klarigi sian kverelopinion. Ni kunlaboru, ni kundiskutu; ni ne interbatalu, ni ne surdiĝu.

Brian Bishop

18 sep 2009 en Roudnice nad Labem forpasis

Jiří Laube (1923–2009)

ĉeĥa esperantisto, honora membro de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la aŭtoro de *Ĉu kultura integriĝo de Eŭropo?* (2008).

21 sep 2009 en Zagrebo forpasis

Roger Imbert (1938–2009)

franco, ekde 1960 li loĝis en Kroatio, gvidis kursojn, tradukis, verkis satirojn kun la pseŭdonimo Histriko, kuniciatis Pup-teatran Internacian Festivalon kaj kunlaboris en pretigo de la Zagreba metodo de la instruado de Esperanto.

11 okt 2009 en Jdeideh (Libano) forpasis

prof. Salah Ghanem (1933–2009)

psikologo kaj grafologo, esperantisto ekde 1960, multjara prezidanto de la Libana Esperanto-Asocio, aŭtoro de araba lernolibro de Esperanto, Honora membro de UEA ekde 2003.

Ni funebras kaj kondolencas.

Monato

En 1978 la Aŭgsburga ĵurnalisto Stefan Maul ellaboris koncepton de ĉiusemajna magazino en Esperanto pri politiko, ekonomio, kulturo, tekniko kaj scienco simila al la gravaj naciaj semajnjurnaloj *Time*, *Newsweek*, *Der Spiegel*. Laŭ Maul, por eldoni tian gazeton necesus ĉirkaŭ dek mil abonantoj.

Por testi la ŝancojn necesis eldoni provnumeron. *Semajno* №0 aperis en septembro 1978, formato A4, granda foto sur la kovropaĝo, anoncanta la ĉefmaterialon *Terorismo mond vasta*. Aliaj artikoloj temis pri kiel Moskvo preparas Olimpiajn Ludojn, proprastila demokratio de Hispanio kaj gerontologio. La rubrikoj estis pluraj: “Opinio de l’ Semajno” esprimiĝis pri Afriko. Sur deko da paĝoj sekvis “Raportoj de l’ Semajno” pri azilproblemo, sendependiĝaj tendencoj en Skotlando, energio, transporto, sindikatoj k.a. Du mallongaj libreprezentoj kompletige al la novelo *La piedirantaj anĝeloj* de J.H.Sullivan formis la beletran parton. En la distraj paĝoj oni povis legi pri farado de nevelkaj bukedoj, trovi recepton de brazila specialaĵo, konatiĝi kun la kuraceblecoj de la Morta Maro. Infanoj ankaŭ havis sian rubrikon. La nula numero impresis multajn, sekvis tujajn abonojn, sed baldaŭ montriĝis, ke la merkato ne estis sufiĉe granda por semajna gazeto. En printempo 1979 Maul anoncis, ke la eksperimento fiaskis. Multaj bedaŭris ĉesigon de *Semajno*, aliaj triumfe mokis.

Semajno restus epizodo, se ne aperus sursceneje la belga eldonisto Torben Kehlet, kiu proponis al Maul eldoni samtipan revuon monatan. Maul konsentis kaj reverkis la koncepton kun multaj kompromisoj.

En januaro 1980 aperis la unua numero de *Monato*. Estis pli multaj distraj elementoj kun la strebo aperigi magazinon por la tuta familio, kun rubrikoj por infanoj kaj junuloj, pri hobiaj, kaj artikol-serio. Por varbi abonantojn la eldonisto vojaĝis tra Usono kaj la redaktoro prelegvojaĝis en Japanio. La redakcia enketo fine de la unua jaro montris, ke la legantoj havis altgradan kontentecon: 28% legis ĉion, kaj preskaŭ 60% plej grandan parton. Tio signifas, ke 88% estis *intensaj legantoj*, pri kio nur revas la ordinara revuo. Malgraŭ tio la magazino ne furoris, la nombro da abonoj ne superis 2000 kaj ĝi restas tre stabila inter 1600 kaj 1800.



Krizo trafis *Monaton* en printempo 1984, kiam la eldonisto senaverte ĉesigis la eldonadon. Al savado oni sukcesis persvadi pintulojn de UEA, kies Grafika Centro Antverpeno (GCA) transprenis la administradon kaj faktan eldonadon kun garantio de sendependeco de la magazino. Kvar jarojn poste UEA decidis forlasi la ekspansian politikon, fermante siajn oficejojn, ankaŭ tiun en Antverpeno. Flandra Esperanto-Ligo, aĉetinta ĉiujn havaĵojn de GCA, transprenis la eldonadon de *Monato*.

En 1991 pro troŝarĝiteco Maul petis, ke oni serĉu alian ĉefredaktoron. Neniu aŭdacis transpreni la postenon kaj la solvo estis trovita tiel, ke ekde 1992 eklaboris skipo de redaktoroj sub gvido de redakcia sekretario Paul Peeraerts, kaj Maul, kiel ĉiunumera kolumnisto, garantiis certan kontinuecon. Inter la redaktoroj estis William Auld (novelo, poezio), Gerrit Berveling (spirita vivo), Tim Carr (medio), Mark Fettes (monda vilaĝo), Evgeni Georgiev (hobio), Paul Gubbins (politiko, moderna vivo), Stefan Maul (vidpunkto), Alexander Mikiŝev (turismo), Seán Osborne (muziko, humuro), Paul Peeraerts (komputado, libroj, noticoj), Roland Rotsaert (ekonomio), Izabel Santiago (kuirado), Krys Ungar (arto, scienco), Guido van Damme (leteroj), Jean-Pierre Van den Daele (enigmoj), Yamasaki Seikō (lingvo). Danke al rapide evoluanta reto *Monato* aplikis reviziadon de la tekstoj per kontrollego far diversnaciaj esperantistoj.

En 1998 aperis kelkaj artikoloj, kiuj ĉagrenis plurajn homojn. Inter ili estis ankaŭ Auld, kiu forlasis proteste sian postenon de la redaktoro de *Monato*. Tiuj eventoj premisis revenon de Maul

al la ĉefredaktoreco de la magazino en 1999, kvankam kun reduktita taskaro.

Laŭ la redakcia noto, *Monato* ĉiam celas objektivitecon kaj bonvenigas artikolojn, kiuj spegulas ĉiujn flankojn de konflikto aŭ de disputo. Alia principo estas, ke nur tiu, kiu loĝas en la lando aŭ kiu intime kun ĝi rilatas, verku pri tieaj cirkonstancoj. Sed, se la redakcio de *Monato* ne ricevas artikolojn el la koncerna lando, ĝi devas de tempo al tempo, okaze de gravaj okazintaĵoj, turni sin al raporto el najbaraj ŝtatoj.

Tia intenco, bedaŭrinde, ne ĉiam estas facile plenumbla. Regule legante *Monaton*, oni konstatas, ke, se juĝi laŭ la ofteco de artikol(et)oj, kio ŝuldiĝas al aktiveco de unusola ĵurnalistema esperantisto, en la antaŭaj jaroj rimarkeble elstaris Litovio, ĉi-jare Albanio, Burundo kaj Japanio. Sed, ekzemple, Ruslando estas malofta gasto sur la paĝoj de la magazino, nur ĉar mankas regula verkemulo.

En la pli fruaj jaroj en *Monato* ofte aperis provokaj artikoloj aŭ komentarioj, kiuj estigis viglajn diskutojn. Sendube tiaj provokaj eventoj estis la golfa milito en 1999 aŭ la NATO-milito kontraŭ Serbio. Novan lavangon da legantaj leteroj elvokis kontribuado de la usonano Alexander Gofen pri la prezidento Obama.

Tra la jaroj *Monato* iĝis pli bunta, pli distra el la enhava vidpunkto, kaj el la aspekta. Okulfrapa korlilpaĝo kun tuta paĝa foto en ruĝa kadro havigis indan lokon por la magazino en iu ajn propaganda ekspozicio, helpanta pruvi al la neesperantistoj, ke nia lingvo estas vivanta, aktuala kaj utila, ja valora. Nun la kovrilo kaj kelkaj internaj paĝoj estas plenkoloraj. La titolo iĝis malpli granda, sed sur la rekonebla ruĝa kvarangulo.

Monato havas kelkajn specifajn trajtojn. Ĝi estas ne priesperanta revuo, sed revuo en Esperanto, en kiu la lingvo mem kaj ĝia komunumo praktike ne estas traktataj. *Monato* uzas la lingvon por la tuta gamo de la homa vivo, politiko, ekonomio, kulturo, ĉiutagaĵoj, sociaj kaj socialaj temoj. Tial ne estas super-taksebla ĝia rolo en la evoluigo de la lingvo. Kiam en la socio aperas novaj fenomenoj aŭ objektoj, estas ĝuste *Monato*, kiu ekuzas bezonatajn por ili vortojn. Tiel enkondukiĝis, ekzemple, la vorto “poŝtelefono”. Multaj novaj vortoj en NPIV havas la fontindikon *Monato*, kaj jam en 1994 realiĝis unu el la bonaj ideoj de *Monato* — *Deklingva manlibro pri politiko*.

Halina Gorecka

Tuj apude

Tonkin, Humphrey. *Tuj apude: Gvidilo tra la kvartalo de la Centra Oficejo de UEA. — Rotterdam: UEA, 2008. — 56 p., il.*

Kiam fine de majo 1991 ni, triopo da novbakitaj eldonistoj el Jekaterinburg, venis al Roterdamo, mankis al ni iu ajn turisma gvidilo. Kaj nia celo estis ne turismado, sed konatiĝo kun la funkciado de la Centra Oficejo de UEA, Internacia Esperanto-Instituto en Hago kaj Flandra Esperanto-Ligo (en la apuda Antverpeno). Afablaj oficistoj de la CO donis klarigojn, kie oni promenu kaj kion vizitu. Tiuj promenaj okazis, kaj mirigis nin moderna urbo, manko da antikvaĵoj, blokdomoj kaj bunta loĝantaro, al kiu kontribuis la iamaj kolonioj de Nederlando.

Post dek jaroj mi havis la duan viziton al Roterdamo; tiam mi trapromenis stratetojn ĉirkaŭ la domo de UEA, la muzean kvartalon. Legante la gvidilon *Tuj apude*, mi faras enpensan promenon.

Unue Tonkin rakontas pri la kialo de translokiĝo de la CO de UEA al la nuna domo en la strato Nieuwe Binnenweg (kio signifas “Nova Interna Vojo”) kaj pri la maniero atingi ĝin. La sekva ĉapitro rakontas pri la domo mem, ekkonstruita en la jaro 1887, kiu efektive konsistigas unu kvaronon de la kvarobla domkonstruo, laŭ klasika stilo. En la apudaj stratoj oni renkontas plurajn similajn konstruaĵojn, evidente destinitajn por prosperaj familioj. Sekvas kvar promenadoj. La Centra Oficejo estas elir- kaj reven-punkto de tiuj promenadoj.

La unua promenado kondukas al la Muzea kvartalo, kun priskribo de la laŭvojaj konstruaĵoj kaj historiaj ekskursoj, kompletige aperas biografiaj skizetoj pri la famuloj menciitaj (pentristo Breitner, Erasmus, teologo Arminius k.a.). Troviĝanta ĉi tie Nederlanda Arkitektura Instituto konfirmas la famon de Roterdamo kiel modelo de moderna arkitekturo. Interesa estas Villa Sonneveld, modernisma loĝdomo el 1933. En alia modernisma vilao troviĝas la muzeo de Chabot, dediĉita al la ĉefa nederlanda intermilita ekspresionista artisto Henk Chabot. Muzeo Boijmans Van Beuningen estas la ĉefa artmuzeo de Roterdamo kun reprezentaj verkoj de mezepokaj kaj renesancaj majstroj kaj impona moderna kolekto. Kunsthal estas ekspoziciejo, kaj apude troviĝas Naturhistoria Muzeo.

La dua promenado gvidas al la nord-oriento kaj Heemraadssingel, atentigante pri interesaĵoj arkitekturaj laŭvoje.

La tria promenado kondukas en la antikvan urbeton Delfshaven, kiu estis la iama haveno de la urbo Delft. Dum multaj jaroj Delfshaven kaj Roterdamo estis rivalaj urboj. La haveneto ankoraŭ konservas plurajn domojn el la epoko de la Pilgrimpatroj, angloj, kiuj dum dek unu jaroj loĝis en Nederlando por eviti persekuton en Anglio. En 1620 ili ekvojaĝis ŝipe trans la Atlantiko kaj fondis kolonion en Masaĉuseco.

La lasta promenado proponas tra-boati la havenon. Komfortaj rondvojaĝaj boatoj ekiras ĉiujn 45 minutojn; ankaŭ eblas lui Maas-taksion por, ekzemple, ĉirkaŭiri la Nordan insulon aŭ vidi grandan parton de la rivera flanko de la urbo. Elegantaj modernaj pontoj Erasmo kaj Willemponto apartenas al la ĉefaj vidindaĵoj de la urbo.

Halina Gorecka



La reveno de Bonhumora Zamenhofano

Ŝapiro, Jakobo. *Babiladoj de bonhumora Zamenhofano / Postparoloj de Tomasz Chmielik, Felicja Raszkina-Nowak. 3a eld. — Czeladź: Hejme; [Ŝwidnik]: Libro-mondo, 2009. — 40 p.*

La Esperanto-movado havas plurajn mokindajn trajtojn kaj eventojn. Satiraĵojn tiutemajn verkis pluraj aŭtoroj (legu la bonan kolekton *Samideanoj*,

Sezonoj, 2006). Jakobo Ŝapiro mokas la lokan Esperanto-klubon en urbo L. Ni povas diveni, ke temas pri Lodzo, sed evidente ankaŭ aliloke okazis kaj eĉ plu okazas similaĵoj. Oni dormeme enuas dum klubkunvenoj, krokodile klaĉas, intrigas por okupi “gvidan” (fakte, sen-signifan) postenon... En la klubo kuŝas kelkaj malnovaj, neniam legataj revuoj; sur muro fiere pendas oficiala permeso okazigi Esperanto-kursojn — sed kursoj mem neniam okazas... Jen la aŭtoro petole fantazias, kio okazus, se li fariĝus idisto; jen li prezentas program-artikolon por nova Esperanto-gazeto, neniam lanĉita reale... Plurfoje aperas versaj pecoj, parodiantaj *La Vojon* de Zamenhof. La ironio estas sufiĉe milda, kompare kun postaj verkoj de aliaj aŭtoroj; ofte senteblas tipe juda mikso de humoro kun malgajo...

Supozeble ĉio fidele priskribas la realon, nur kun ioma troigo. La tuto estis verkita ĵus antaŭ la Unua Mondmilito; dum preskaŭ jarcento poste la mondo grave ŝanĝiĝis, tamen — vi nepre rekonos en nunaj esperantistoj kaj “amikoj de Esperanto” similecon al ties prauloj.

La unua eldono de *Babiladoj de Bonhumora Zamenhofano* aperis en 1922, la dua en 1924, la libro estis tre varme akceptita. L. Totsche skribis en *Literatura Mondo*: “la libro apartenas al la plej bonstilaj verkoj de l’ Esperanta literaturo kaj tial ĝi estas tre rekomendinda ankaŭ por komencantoj volantaj sin ekzerci en la lingvo” (mi aldonu: tiuj komencantoj bone pripensu la aferojn, por ne ripeti fuŝojn de la protagonistoj).

Nun la eldonejo *Hejme* redonis al ni tiun kortuŝan raraĵon. Kvin felietonoj kun la aŭtoro antaŭparolo okupas nur iom pli ol duonon de la libreto; sekvas eseo de Tomasz Chmielik kaj fragmentoj el rememoroj de Felicja Raszkina-Nowak (nevino de la aŭtoro, la sola el la familio, kiu elvivis dum la Dua Mondmilito) pri Jakobo Ŝapiro. Ni ekscias, kion li faris por Esperanto kaj kia li estis en ordinara vivo, kia tragika sorto lin atendis. Indas dankeme rememori lin apud lia samsortano Izrael Lejzerowicz, kies *Verda Biblio* estis reeldonita samloke unu jaron pli frue.


Por ni, kiuj vizitas Bjalistokon, aŭ legas ion el multaj raportoj pri ĉi-jara UK, certe memorfiksiĝos ne nur majstro Zamenhof, sed proksime al li ankaŭ Jakobo Ŝapiro — sidanta surfenestre en danda pozo, kun ĉapelo sur piedpinto, sed kun profunda tristo en la okuloj...

Valentin Melnikov

Esperanto en muziko ne nur en Esperantujo (6)

Oni povintus pensi ke ĉi tiu temo elĉerpiĝis, ĉar ĉi-jare la serio paŭzis. Sed la homoj — ankaŭ artistoj en diversaj landoj — malkovras Esperanton, kaj ili iamaniere estas influitaj de ĝi, jen pro la lingvo mem, jen pro ĝia idea kaj simbola filozofio, jen nur pro la bela nomo de la lingvo. Ni daŭrigas.

La verda disko *Verda disko*



Grava evento okazis ĉi-somere, pri kiu ni ankoraŭ ne parolis en ĉi tiu rubriko, kvankam multaj legantoj de *La Ondo* jam konas ĝin. Ĉi tiu disko havas ĉeflokon ĉi tie, ĉar ĝi aperis okaze de la 94a UK en Bjalistoko. En ĝi polaj artistoj el Bjalistoko kantas en Esperanto! Tio malfermas la pordon al multaj aliaj kiuj tiel aŭdis pri Esperanto...

En ĉi tiu kompilaĵo troviĝas muzikaĵoj de jenaj Podlaĥiaj artistoj: *5set5*, *Bolo Young*, *Bright Ophidia*, *Cira & Nikon* gaste *Hukos*, *Devil Blues*, *Emptv*, *Milka & Chociey*, *My a*, *Orejro*, *Red Emprez*, *Rima*, *Sami Muzycy* gaste *Diana Giurow*, *Schody*, *Zerova*, *Zero-85*, *Złodzieje Rowerów*. La tekstojn tradukis en Esperanton Przemysław Wierzbowski.

La Bjalistoka iniciato estis granda defio, kaj ĝi meritas laŭdon pro la plenumiĝo sukcesa kaj ĝustatempa... — granda entrepreno kiun vi povas plene ĝui ankoraŭ nun en la reto eĉ se vi ne sukcesis ekhavi la diskon:

<http://www.myspace.com/verdadisco>

Esperanto el Ruslando

Ĝi estas projekto de Ruslanda DJ el Moskvo, kiu muzikas laŭ minimalista elektronika stilo kun influoj de tekno kaj haŭso. Momente en lia paĝo nur unu muziko sen voĉoj ludiĝas, sed rusoj ja povus instigi lin aldoni pliajn...

http://www.myspace.com/esperanto_project

Esperanto de *Another Fine Days*

La brita bando *Another Fine Days* eldonis en 1994 la elektronikan vinilan diskegon *Life Before Land*, kiu enhavas la muzikaĵojn *Esperanto* — etoso-elektronika instrumenta verko, en kies komenco aŭdiĝas anonco de Esperanto-radioprogramo en radio... La albumo estis reeldonita sub KD en 2004. La bando plu ekzistas, koncertas kaj regule eldonas novajn albumojn. Ilia aktuala muziko iĝis pli etna kun ĵazecaj funkafrikaj influoj.

<http://www.myspace.com/anotherfineday>

Doktoro Esperanto

La Novjorka *Doktoro Esperanto* estas fatrasa bando, kiu laŭdire ludas alternativan kaj eksperimentan ciganan kabaredan muzikon "... laŭ influoj de Ludwig Lazarus Zamenhof". Ne eblas diri pli multe, ĉar ankoraŭ neniu aŭskultebla muziko aperas en ilia Miaspaca paĝo. Ĉu nur blago?..

<http://www.myspace.com/doktoresperanto>



La bando *Esperanto* el Londono

Jen plia bando *Esperanto* el Londono. Ĝi starigis sian propran eldonejon *Esperanto musik*, proponante pure elektronikan muzikon laŭ etoso-stilo. Plejparte en la aŭskultebla kompilo estas anglaj titoloj, krom unu (*Le Monde*) en la franca.

La Esperantoj uzas siajn voĉojn kiel aldonan instrumenton en la senvoĉaj muzikaĵoj.

<http://www.myspace.com/esperantomusikworx>

La sama nomo ankaŭ en Pollando

La hiphopa triopo *Esperanto* kantas efikan repon en la pola. La bando eldonis sendepende en 2008 la 15-titolan albumon *Miejska Kaligrafia*, en kiu aperas du versioj de la kanto *Esperanto*, aŭskulteblaj ĉe Miaspaco. Kurioze, la kanto *Esperanto* de la grupo *Esperanto* ja estas pollingva!

<http://www.myspace.com/esperanto>



La turka albumo *Esperanto*

La turka hiphopa bando *Cubido* eldonis sian albumon *Esperanto* surdiske kaj interrete. Jen la raraĵo! Vere originala orienta repo kantata en la turka. Pluraj titoloj aŭskulteblas ĉe:

<http://www.myspace.com/cubido>

Esperanto *Slowem* el Pollando

Jen plia kontribuo el Pollando — hiphopa duopo, eldonita en la brita muzikeldonejo SXhii-Boy Records. La duopo repas pole... laŭ specifa repa novĵazeca stilo.

http://www.myspace.com/esperanto_slowem

Uliczne *Esperanto*

La pola hiphopa kvaropo *Mor W.a.* fondiĝis en Varsovio en 1995 kaj ekde tiam faris pli ol cent koncertojn en Eŭropo kaj Ameriko kaj eldonis kvar diskojn.

La plej freŝa el ili, *Uliczne esperanto* (La strata Esperanto) aperis somere 2007 kaj rapide populariĝis en Pollando. La samtitola kanto el la albumo estas aŭskultebla kaj spektbla plurloke en la reto, ankaŭ en Miaspaco:

<http://www.myspace.com/morwa4>

Plej muzikume
Flo!

Belartaj Konkursoj de UEA en 2010

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 61a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 95a Universala Kongreso en Havano. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, escepte de infanlibroj. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Validas krome la jenaj kondiĉoj:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita;

Prozo: maksimuma longo 200×65 karaktroj (kvino da paĝoj);

Teatraĵoj: maksimuma longo ne fiksita;

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo “Interproksimigo de kulturoj”, proksimuma longo 400 x 65 karaktroj (deko da paĝoj); la unua premio nomiĝas “Luigi Minnaja”;

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2009. Unu premio;

Filmo kaj Kanto: ĉi-foje, eksperimente, la juĝantaroj mem elserĉos premiindajn verkojn.

Ĉiujn konkursaĵojn — en unu ekzemplero, escepte de tiuj por la branĉo Infanlibro — oni devas sendi al Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio, aŭ prefere rete al la adreso: michela.lipari@tiscali.it, indikante pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro.

Premioj: unua premio 240 eŭroj, dua premio 168 eŭroj, tria premio 96 eŭroj; Nova Talento 168 eŭroj; Infanlibro de la Jaro 504 eŭroj.

La detala regularo haveblas ĉe UEA, kaj legeblas ankaŭ ĉe http://uea.org/dokumentoj/belartaj_konkursoj_regularo.html

GK UEA

Ricevitaj libroj

Gvidlibro 2009 / Red. Roy McCoy. — Rotterdam: UEA, 2009. — 96 p. — [Donaco de UEA].

Marček, Stano. *Esperanto tiesioginiu metodu*: [Lernolibro por litovoj] / Tradukis el Esperanto Indrė Pileckytė. — Martin: S. Marček, 2008. — 114 p., il. — [Donaco de LitEA].

Pereira, Yvonne A. *Memoraĵoj de sinmortiginto* / Tradukis el la portugala Alfonso Borges Gallego Soares. — Rio de Janeiro: Spirita eldona societo V.F. Lorenz, 1998. — 554 p. — [Donaco de la eldonejo].

Podlaĥia Provinco. La plej gravaj turismaj allogaĵoj / Tradukis el la pola Przemysław Wierzbowski. — Białystok: ELKAM, 2009. — 24 p., il. — [Donaco de Aleksej Korĵenkov].

Rosegger, Peter. *Die Entdeckung von Amerika = De outdekking van Amerika = La trovo de Ameriko = Tre discovery of America*: Kvarlingva rakonto / Tradukis el la stiria Walter Klag patro. — 3a eld. — Vieno: Klag, 2009. — 12 p., il. — [Donaco de la eldonejo].

Ŝapiro, Jakobo. *Babiladoj de bonhumora Zamenhofano*. / Postparoloj de Tomasz Chmielik, Felicja Raszkin-Nowak. — 3a eld. — Czeladź: Hejme; Libro-mondo, 2009. — 40 p. — [Recenzoekzemplero].

Tonkin, Humphrey. *Tuj apude*: Gvidilo tra la kvartalo de la Centra Oficejo de UEA. — Rotterdam: UEA, 2008. — 56 p., il. — [Recenzoekzemplero].

[Заменгоф Л.М.] Дръ Эсперанто. *Полный словарь Эсперантскаго (международнаго) языка. Часть русско-эсперантская. Plena vortaro rusa-internacia*: Репринтное изд. / Предисловие Елены Шевченко. — М.: Импэто, 2007. — 280 с.; 500 экз. — [Aĉeto].

Ricevitaj gazetoj

Esperanta Finnlando, 2009/5; Esperanto, 2009/11; Heroldo de Esperanto, 2009/12; Informa Bulteno, 2009/3; Juna Amiko, 2009/2; La Movado, 2009/703,704; La Sago, 2009/58; Le Monde de l'Espéranto, 2009/570-571; Literatura Foiro, 2009/241; La Ondo de Esperanto, 2009/11; Monato, 2009/11; Okazas, 2009/570-571; REGo, 2009/5; Svisa Esperanto-Societo Informas, 2009/4; Tempo, 2009/103; Usona Esperantisto, 2009/5.

Gazetoj

Literatura Foiro, 2009, №241

La eventoj en Centra kaj Orienta Eŭropo antaŭ 20 jaroj estas unu el la akcentoj en la oktobra *Literatura Foiro*: la organo de la Esperanta PEN-Centro aperigas la intervenojn de la slovena verkisto Tone Peršak kaj lia norvega kolego Kjell Olaf Jensen prezentitajn dum la PEN-konferenco en Bled, pri la ĉeftemo *La tempo de la libereco*.

Vinko Ošlak detale traktas la temon pri Zamenhof kaj lia etiko, okaze de la 150a naskiĝa datreveno de la Majstro. Sed la etikan temon enkondukas eseo de Leen Deij pri tri pensuloj: Frans de Waal, Nikolaas Tinbergen kaj nia Ludoviko Zamenhof. La numero informas pri la Simpozio pri Homaranismo, okazinta pasintsomere en Ĉaŭdefono.

Nia literaturo en LF 241: uvertura poemo de Lina Gabrielli; Márton Fejes prezentas ligitan epizodon al Esperanto en romano de Béla Illés; recenzo de Josip Pleadin pri la romano *Vismar* de István Nemere; gastas Etel Zavadlav per nepre legindaj pecoj, kiujn ŝi titolis *Du vanaj dialogoj*. Kaj monda literaturo: la ĵusa Nobelo al Herta Müller; rakonto de Marcos Vasconcelos en traduko de Aloisio Sartorato.

La sepa arto: *Nur unu horon volus vin*, filmo de Alina Marazzi recenzita de Giorgio Silfer. Interlingvistiko: omaĝo de Giorgio Silfer al István Szerdahelyi.

Astronomio (kaj ne nur) ĉe Kiril Velkov, pri kio reale okazis sur la Luno la 20an de julio 1969. Armando Zecchin reeĥas al kontribuo de Nikolao Gudskov en LF 239 pri Aristotelo kaj pri la temo “Superstiĉo” en pli frua artikolo de Leen Deij. Timoteo Wüster recenzas la libron *La regrifuzanto kaj aliaj budhismaj fabeloj* de Gunnar Gällmo.

HeKo

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Sendependa internacia
revuo en Esperanto kun
legantoj en 65 landoj!

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

La ĝustajn respondojn por *Sudoku* el la oktobra numero de *LOdE* sendis: Malcolm Jones, Anne George (Britio), Jindřich Tomášek (Ĉeĥio), Bruno Lehtinen (Finnlando), Jackie Huberdeau, Jacques Mabire (Francio), Hans-Burkhard Dietterle (Germanio), Hanna Skalska, Zbigniew Tylkowski (Pollando), Jurij Kivajev (Ruslando).

La loto donis libropremion al *Anne George*. Ni gratulas ŝin!

| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 4 | 9 | 6 | 8 | 5 | 7 | 2 | 1 | 3 |
| 3 | 8 | 7 | 1 | 6 | 2 | 5 | 4 | 9 |
| 1 | 2 | 5 | 4 | 3 | 9 | 6 | 8 | 7 |
| 7 | 1 | 3 | 6 | 4 | 8 | 9 | 5 | 2 |
| 5 | 4 | 2 | 7 | 9 | 3 | 1 | 6 | 8 |
| 8 | 6 | 9 | 5 | 2 | 1 | 7 | 3 | 4 |
| 6 | 5 | 8 | 2 | 7 | 4 | 3 | 9 | 1 |
| 2 | 3 | 1 | 9 | 8 | 5 | 4 | 7 | 6 |
| 9 | 7 | 4 | 3 | 1 | 6 | 8 | 2 | 5 |

Krucvortenigmo

Horizontale: 1. Kvardektaga provo antaŭ kristnasko; 2. Rampulo kun longa maldika vosto; 3. Amaso da malsuperaj plantoj kaj animaloj en akvo; 11. Konstruaĵo, en kiu oni prezentas spektaklojn; 12. Seka peco da pano (R); 13. Japana tradicia vesto (R). 17. ... limoj kaj baroj malpacas najbaroj; 18. ... vivas ne kun mono, sed kun persono; 19. Elektronika duonkonduka elemento; 21. Defendanto de naturo; 22. Dafodilo; 25. Kemia elemento Ce; 27. Turniĝi ĉirkaŭ interna akso aŭ punkto; 28. Tion simbolas branĉoj de pino en novjara ornamo de la japana domo; 29. Juvelo garnita el unu sola diamanto (R); 30. Liniilo; 31. Esprimo aŭ manifestaĵo de honora respekto.

Vertikale: 2. Lando, havanta la plej malnovan flagon; 3. Kredo ke realiĝas tio, kion oni deziras; 4. Plibeligi per aldonaj objektoj aŭ detaloj; 5. Alojto de kupro kaj zinko; 6. Detruo de grundo rezulte de vento kaj pluvo; 7. Lago sur limo de Peruo kaj Bolivio; 8. Barĉo; 10. Baltia ŝtato; 14. Malsana emo; 15. Longa kaj maldika peco de io; 16. Arbo el sekaj regionoj de Afriko kaj Aŭstralio (R); 19. Komunikigo inter mensoj per aliaj rimedoj ol la ordinaraĵoj; 20. Flanko de horizonto kien sudiras suno; 21. Kaŭkaza monto (R); 23. Estra esprimo de sia volo; 24. Muzo de ama poezio en greka mitologio; 26. Insula ŝtato en Mediteraneo; 26. Muzika teatraĵo.

(R) indikas radikon.

El la literoj en la grizaj kvadratoj formu la familinomon de konata Esperanta poeto kaj sendu ĝin al la redakcio antaŭ la 10a de januaro 2010.

Sukcesojn!

Kompilis Viktor Alikin

| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 4 | 9 | 6 | 8 | 5 | 7 | 2 | 1 | 3 |
| 3 | 8 | 7 | 1 | 6 | 2 | 5 | 4 | 9 |
| 1 | 2 | 5 | 4 | 3 | 9 | 6 | 8 | 7 |
| 7 | 1 | 3 | 6 | 4 | 8 | 9 | 5 | 2 |
| 5 | 4 | 2 | 7 | 9 | 3 | 1 | 6 | 8 |
| 8 | 6 | 9 | 5 | 2 | 1 | 7 | 3 | 4 |
| 6 | 5 | 8 | 2 | 7 | 4 | 3 | 9 | 1 |
| 2 | 3 | 1 | 9 | 8 | 5 | 4 | 7 | 6 |
| 9 | 7 | 4 | 3 | 1 | 6 | 8 | 2 | 5 |

Spritaĵaj splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Komiteate kaj komunike, aŭ komate kaj komike?

Pere de la dumjara informa laboro ligita kun perado de informoj pri gravaj eventoj en la E-komunumo okazis ĝenerale plurfoja atentigado pri la neceso de intensigado de kontaktoj kun la nacilingvaj ĵurnalistoj. (Informo al la Komitato pri plenumo de la komitataj decidoj en Roterdamo, julio 2009, Bjalistoko)

Kiu kortolos la kontrolistojn?

... la versojn esperantigis Jiří Kořínek, la tekston kontrolis d-ro Tomáš Pumpr. (Božena Němcová. *Malgranda monografio*, Praha: Osvětový ústav, 1961. Literatura aldono al la revuo *Paco*, p. 20, kolofono)

La pena ŝnurdancado

... en la retujo www.ivolapenna.org estas publikigitaj <...> interalie la akrobatigita versio de diversaj libroj kiel Esperanto en Perspektivo aŭ Retoriko... (Andy Künzli. *Inter "aktiva neŭtraleco" kaj "humaneca internaciismo" // La Gazeto*, 2009, №144, p. 23)

Frandu person

La libro finiĝas per receptoj de kelkaj manĝaĵoj. Havante iranajn geamikojn, mi povas atesti pri ilia tre agrabla gusto! (Anneke Buys. *Esperantigante rifuĝintojn el Afganio // Monato*, 2009, №11, p. 22)

UN baldaŭ kalva

24 de oktobro 2009, en tago de 54-hariĝo de Uno ... (Mikaelo Lineckij, 16 aŭg 2009, <http://groups.yahoo.com/group/esper-inform/message/4502>; rimarkis Lu Wunsch-Rolshoven)

Ĉu menukarto?

Ni povus preni iun vorliston <...> kaj regule aldonadi el ĝi ĉion ajn... (Mikaelo Povorin, 30 sep 2009, <http://tech.groups.yahoo.com/group/tradukado/message/6448>)

Ĉu nova lando en Afriko?

La edukado de la tologanda virino (Titolo de artikolo en *Femina*, 2009, №19, p. 11; malkovris Katarzyna Marciniak)

Maldensa sed nutra bazo

laŭ piĉ esperanto estas lingvo komputila. ĝi havas ne nur la buljonan fundamenton, sed eĉ unu internan fundamenton, la kibernetikan... (Josef Dörr: *La lingvaj teorioj de Karolo Piĉ*. 2008: eldonejoferlag, sekcio 3.1; origine ĉio minuskle; rimarkis Ionel Oneț)

La boxna lingvo

La nederlandlingvan paroladon de Profesoro Jansen estis "Esperanto, een taal om van te houden" (Esperanto, ŝateninda lingvo) baldaŭ estos elŝuteblas en la paxagro edukado.net. (<http://www.ipernity.com/doc/edukado.net/5887038>, d-ro inĝ-o W. H. Jansen, 11 nov 2009)

Plukis István Ertl

Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo – Mendoza

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio: FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

Brazilo: BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF

Britio: EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

Bulgario: Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

Estonio: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

Hispanio: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

Hungario: HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Islando: IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

Italio: IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

Japanio: JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tôkyô-tu, 162-0042

Katalunio: KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

Kroatio kaj Slovenio: Višnja Branković (vd. Italio)

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

Litovio: LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

Nederlando: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

Nov-Zelando: G.David Dewar, 24 Date Crescent, Halswell, Christchurch, NZ-8025

Pollando: PEA, Aleja Wolności 37F/7, 33-300 Nowy Sącz

Portugallio: PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

Ruslando: Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

Serbio: Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

Sud-Afriko: Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

Svedio: Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

Usono: ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



Ruslando. Fine de oktobro kaj komence de novembro, kiam multajn regionojn de Ruslando kovras neĝo, en la nigramara Soĉi daŭras milda fruaŭtuno. Tion profitis la partoprenantoj de TILÉ-5 (vd. p. 11), kiuj ne nur diskutis, sed ankaŭ multe ekskursis kaj fotiĝis apud Soĉiaj vidindaĵoj. (*Vladimir Bespalov*)



Germanio. La partoprenantoj de la 6a Rata Rendevuo (vd. p. 8) en Hameln, kie funkcias la Esperanto-Grupo *Ratkaptista bando* la 24an de oktobro estis ekskursgvidataj de la Ratkaptisto mem. Ili estis pli bonŝancaj ol la elfabelaj ratoj kaj infanoj, kaj post la ekskurso bonorde revenis hejmen. (*Heinz-Wilhelm Sprick*)



Kroatio. En la kultura programo de la jubilea renkontiĝo “120 jaroj da Esperanto en Osijek kaj Kroatio” (vd. p. 4) kantis, dancis kaj ludis en Esperanto kaj en la kroata lingvo, grupo el 25 infanoj 10–15-jaraj el la Zagreba lernejo *Davorin Trstenjak*. (*Davor Klobučar*)



JORGE LUIS BORGES
La sekreta miraklo

Jorge Luis Borges. *La sekreta miraklo*
 Serio Mondliteraturo, Volumo 16
 200 paĝoj, 18 eŭroj



Jules Verne

Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj


Londono
 - 2 okt. merkredo, 8:45 vespero
 Parizo
 - 3 okt. ĵaŭdo, 7:20 mateno -
 - 3 okt. ĵaŭdo, 8:45 mateno
 Brindizio
 - 5 okt. sabato, 4:00 vespero -
 - 5 okt. sabato, 5:00 vesperto
 Suez
 - 8 okt. merkredo, 11:00 mateno

Jules Verne. *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj*
 Serio Mondliteraturo, Volumo 15
 208 paĝoj, 20 eŭroj



István Nemere
**Serpentoj
 en la puto**

István Nemere. *Serpentoj en la puto*
 Originala romano pri terorismo
 184 paĝoj, 18 eŭroj



Georges Simenon

**Maigret
 eraras**

Serio "Mondliteraturo", No 17

Georges Simenon. *Maigret eraras*
 Serio Mondliteraturo, Volumo 17
 128 paĝoj, 12 eŭroj.